

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Ū-19034/1997  
Esperanto

POPOLA  
GINTIO

中國新道

1

1997

ISSN 0032 - 4361

**Ni, gejunuloj de EPO-redakcio**

Hejmloko de ĉielaj ĉevaloj

Anekdotoj pri bovo

Prospektivo al la nova  
internacia lingva ordo



En vintro

Foto de Liu Chunying

## INTER NI

*Ĉe la sojlo de 1997 ni adresas bondezirojn al niaj karaj legantoj.*

*Fininte la redaktadon de la lasta numero de EPĈ, 1996, ni demetis la plumon por kurta ripozo. Tamen nin atendas la nova tasko de 1997. La laboro estas streĉa, ni tamen estas ĝojaj, ĉar ni laboras por nia komuna lingvo Esperanto kaj nia komuna afero, por la interkompreno, amikeco kaj paco de la homaro. Vidante, ke nia abonkvanto iom kreskis, ni sentas grandan ĝojon kaj kore dankas niajn legantojn novajn kaj malnovajn pro ilia subteno al nia revuo. Iuj el ili ne plu abonas nian revuon pro granda aĝo, tamen ili daŭre kontaktiĝas kun ni en aliaj manieroj. Ili varbis por ni novajn abonantojn. Pli ĝojinde estas, ke post la 81-a UK kaj la Unua Azia Kongreso de Esperanto plimultiĝis junuloj inter niaj novaj abonantoj. Ili estas espero de nia afero.*

*En la pasinta jaro niaj legantoj donis al ni kuraĝigon kaj konsilojn. Rekompence por tio ni devas pli energie labori. Kiuĵ ŝanĝoj estos en nia revuo en la nova jaro? Atentemaj legantoj eble rimarkos en ĉi numero, ke iom mallongiĝis artikoloj pri la ĉina ekonomia konstruado, intime rilata al la popola vivo. Ni multigos raportojn pri la socia vivo kaj ĉina kulturo. Ĉi-jare ni malfermis novajn rubrikojn "Junularo", "Ordinaraj Ĉinoj" kaj "Homaro kaj Naturo". Ni rezervis iujn malnovajn rubrikojn, kiaj "En Ĉinaj Urbetoj", "Temo Proponita de Legantoj", "Originale Verkitaĵ" kaj "Ĉinaj E-istoj", kiuj estis ŝatataj de multaj legantoj. Por la rubriko "Laŭ la Silka Vojo" ni daŭrigos nian vojaĝon.*

*Ni esperas, ke nia revuo freŝe impresos niajn legantojn en la nova jaro.*

**La Red.**



# El Popola Ĉinio

1 [460] 1997



Gejunuloj de EPC-redakcio  
Foto de Tong Xin

La gejunuloj de EPC-redakcio, ĝia nova forto, laboras por Esperanto kaj amikiĝo kun samideanoj de diversaj partoj de la mondo. Ili kreskas kun evoluo de la redakcio.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"


Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P.O. Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

# ENHAŬO

- |   |   |
|---|---|
| <p>2 <b>INTERNI</b></p> <p>4 <b>JUNULARO</b><br/>Ni, gejunuloj de EPC-redakcio;<br/>"Elhaŭtiĝu, krokodiloj!"</p> <p>8 Prospektivo al la nova internacia lingva ordo</p> <p>10 Interesa renkontiĝo de esperantistaj familioj</p> <p>11 <b>ORIGINALE VERKITAĬ</b><br/>Maldungo; Otto, finna senlaborulo</p> <p>13 <b>ESP-NOVAĬOJ</b></p> <p>14 <b>POR KOMENCANTOJ</b><br/>Edifo de blindulo</p> <p>15 <b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ</b><br/>La dua familio de ŝuistoj</p> <p>17 Tibeta ŝtonskulpturo elspiranta religiecon</p> <p>20 <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b></p> <p>21 <b>EN ĈINAJ URBETOJ</b><br/>En ŝtona mondo</p> <p>24 <b>EKONOMIE</b><br/>Kial malmultiĝis pasaĝeroj de trajno?<br/>Ĉinio — la kvina turisma lando;</p> <p>28 Gazetara konferenco sen</p> | <p>angla-lingva interpretado</p> <p>29 <b>LAŬ LA SILKA VOJO</b><br/>Hejmloko de ĉielaj ĉevaloj</p> <p>36 Ĉinaj kuracistoj en aliaj landoj</p> <p>38 Ĉinio en la okuloj de eksterlandanoj</p> <p>40 Kie oni faras sportojn?</p> <p>42 Ĝojo en filatelo</p> <p>43 <b>HUMURAJ VERSAĬOJ</b><br/>La azeno de Afanti</p> <p>44 <b>ORDINARAJ ĈINOJ</b><br/>Urbaj beligistoj</p> <p>46 <b>ĈINA KULTURO</b><br/>Anekdotoj pri bovo</p> <p>48 <b>POR VIA SANO</b><br/>20 sanigaj ekzercoj (I)</p> <p>49 <b>INFORMOJ • REKLAMOJ</b><br/>Oficinala uzado de ruĝaj formikoj</p> <p>50 <b>KORESPONDI DEZIRAS</b></p> <p>51 <b>ĈINAJ METIARTAĬOJ</b><br/>Telero kun salikokaj reliefoj</p> <p>2 En vintro</p> <p><b>SUR LA DORSKOVRILO [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]</b><br/>En la kamparo de Smolando, Ŝvedio<br/>Mueliloj de Nederlando</p> |
|---|---|



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                   |                     |
|-------------------|---------------------|
| 1. Anshun (p. 21) | 3. Qingdao (p. 15)  |
| 2. Tibeto (p. 17) | 4. Hangzhou (p. 20) |



# Ni, gejunuloj de



**Sun Aijun:**

## SUNO ESTAS MIA ESPERANTA NOMO

Karaj legantoj, karaj junaj amikoj, kiel novjaran donacon por vi ni malfermis en nia revuo novan rubrikon "Junularo", pri kiu mi respondecas. Je la komenco de tiu rubriko gejunuloj de la redakcio de EPC salutas vin per sinprezentado kaj deziras al vi feliĉan novjaron.

En Ĉinio estas diro: "Junuloj estas suno en la 8-a kaj 9-a horo matene." Junuloj estas espero de Esperanto kaj ankaŭ estonteco de EPC. Plejparto de niaj legantoj estas mezaĝuloj kaj maljunuloj. Iuj junaj legantoj ne ŝatas iujn artikolojn de nia revuo, opiniante ilin seriozaj. Ĉi-jare ni daŭrigos nian klopodadon por plibonigi nian revuon en have kaj aspekte. Ni malfermis tiun verdan ĝardenon aparte por junuloj.

Kiel prizorgantino de tiu ĝardeno, mi havas memfidon pleniĝi ĝin per floroj ŝatataj de junuloj. Ni prezentos ĉiajn temojn pri lernado, laboro kaj amafero de junuloj; pri hobiaj, sportoj, turismo, kulturo kaj arto; kaj ankaŭ pri nia lingvo. Ĉiuj junuloj estas mastroj de tiu ĝar-

deno. Mi petas vin helpi min per via kontribuajo aŭ propono.


Mia Esperanta nomo estas Suno. Mi havas karakteron varman kiel suno. Mi laboros entuziasme kaj diligente por igi la rubrikon vigla kaj interesa.

**Wang Hanping:**

## MI HAVAS E-FAMILION

Mi patriĝis en 1995. Rigardante la ĉarman ridon de la filineto, mi kore dankis Esperanton, ĉar Esperanto estas svatinto de mia edzino kaj mi, kaj nia filino estas frukto de Esperanto kaj nia amo.

Antaŭ 8 jaroj, diplomiginte el altlernejo, mi eklaboris en la redakcio de EPC. En 1991 mi komencis respondeci pri Esperantaj rubrikoj, kiaj "Esp-Novaĵoj", "Sur Nia Librobreto" kaj "Ĉinaj E-istoj". Ĉiutage mi ricevis leterojn de samideanoj el diversaj lokoj de la mondo. Trakti leterojn kaj redakti artikolojn estas iom komplike, tamen interese por mi. Tiuj leteroj mal-



**Wang Hanping, lia edzino kaj ilia filino**



# EPĈ-redakcio

fermis antaŭ mi fenestrojn al la mondo.

Mi deziras pli vastan kaj intiman komunikigon kun la legantoj en la nova jaro. Mi sincere petas leterojn, artikolojn, informojn pri E-movado kaj sugestojn por nia revuo. Mi kaj miaj kolegoj kombinos nian kapablon kaj la deziron de niaj legantoj por plibonigi nian revuon.

**Xiang Hong:**

## FILMO PLORIGIS MIN

La traduka sekcio estas parto de la redakcio de EPĈ. Mi estas membro de la traduka sekcio, kaj Esperanto estas parto de mia vivo — ĝi estas mia okupo. Por mi tia laboro estas iomete monotona, kaj mia postlabora tempo plejparte konsumiĝis en legado de libroj kaj spektado de videobendoj (rakontaj filmoj). Ĝuste pere de interparolado pri filmo mi amikiĝis kun korea esperantistino Kim Miran dum la 79-a UK okazinta en Seulo en 1994. La gastama Miran eĉ



invitis min en iun malgrandan videobendprojekciejon en Seulo por ĝui du rakontajn filmojn pri amafero. Ni ambaŭ larmis dum la spektado kaj forlasis la projekciejon kun ruĝiĝintaj okuloj. Esperanto konsciigis min, ke en foraj landoj ekzistas homoj intimaj al mi, kvankam ni apartenas al malsamaj na-

cioj kaj etnoj, kvankam multe diferencas la kulturaj medioj, en kiuj ni vivas. Mi ofte sopiras Miran kaj ankaŭ samideanon Walter Ullmann de Germanio, mi ofte havas deziron diri ion al ili.

**Wang Jianbing:**

## MI PLEJ MALŜATAS KRUELAN BOKSON

Ekde 1989 mi lernis Esperanton kaj feliĉe fariĝis profesia esperantisto. Tiaj feliĉuloj ne



**Wang Jianbing (la dua de dekstre) kaj alilandaj esperantistoj**

multas en Ĉinio, eĉ en la tuta mondo. En 1991 mi ricevis la laboron redakti "La Mondo", organon de la Ĉina Esperanto-Ligo. Malgraŭ la nomo "La Mondo", la nombro de ĝiaj abonantoj ne pli multas ol tiu de loĝantaro de ĉina vilaĝo (ĉ. mil). La aliaj Esperantaj gazetoj en la mondo plejparte havas la saman sorton.

Por ke Esperanto fariĝu torento, laŭ mia opinio, oni devas fari du provojn: Unue, apelacii al la internacia socio atenti lingvan problemon kaj konsciigi la necescon de la internacia helplingvo; due, fondi tutmondan E-entreprenon por subvencie disvastigi kaj progresigi Esperanton. Se ne, nia Esperanta afero

restos nur enlanda rivero, kiu malaperos antaŭ ol atingi la maron. Tion volas nek vi nek mi.

**Yin Qin:**

### MI ESTAS KANTO-AMANTO


Mi estas kanto-amanto. Mi ŝatas ne nur aŭskulti kantojn, sed ankaŭ kanti. Mi kolektis multe da originalaj sonbendoj kaj videodiskoj. Tamen la kasetoj aĉetitaj de mi dum mia lernado en instituto estas plej karaj por mi. Kreskis la aĝo, ŝanĝiĝis la vivmedio, ŝanĝiĝis ankaŭ la stiloj de la kantoj ŝatataj de mi. En libera tempo la malnovaj kantoj ofte kondukis min en pasintecon. Mi pensas, ke mia amo al muziko akompanos min dum mia tuta vivo.



**Yu Tao:**

### VI ESTAS ĈIAM BONVENAJ ĈE NI

En 1989 mi eklernis Esperanton kaj komencis labori en la redakcio de EPC en 1991. En la redakcio mi sentas min kiel hejme, ĉar tie laboras veteranoj, kiuj dediĉis multajn jarojn al Esperanto, kaj ankaŭ miaj kunlernantoj, kiuj ven-



**Yu Tao**

is el diversaj partoj de Ĉinio.

Estas fakto, ke Esperanto donis al mi multon. Pro kaj per Esperanto mi havas amikojn en

Afriko, Eŭropo, Latinameriko... pro kaj per Esperanto mi intervjuis esperantistan Nobel-premiiton dum la Universala Kongreso en Prago, pro kaj per Esperanto mi aperis en nederlanda televido...

Mi tre ĝojas, ke EPC havas rubrikon por ni gejunuloj, kiun mi jam delonge deziris kiel prezidanto de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, komitatano de TEJO kaj UEA, kaj kiel junulo, kiu ŝatas literaturon kaj sporton, kaj kiu amas Esperanton, amikecon kaj pacon. Mi volonte donos helpon al la rubriko. Mi deziras, ke ĉiuj junaj legantoj ŝatu ĝin.

**Wang Ruixiang:**

### MI VOLAS KONATIĜI KUN PLI MULTAJ E-AMIKOJ



**Wang Ruixiang (dekstre)**

En 1994, kiam la redakcio de EPC komencis mem distribui sian revuon, mi eklaboris en ĝia distribua sekcio, forlasinte la sekcion specialan por distribuado de Esperantaj eldonaĵoj sub la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio.

Antaŭ 16 jaroj mi esperantistiĝis. Dum la pasintaj 12 jaroj de distribuado mi konatiĝis kun multaj E-amikoj ĉinaj kaj alilandaj. Pasintjare mi partoprenis la 28-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson kaj la 81-an UK kaj vizitis Slovakion. Ĉie, kie mi estis, mi aŭdis laŭdojn al nia revuo EPC. Mi fieras pro tio.

Ĉe la sojlo de 1997 mi salutas vin, karajn abonantojn. Mi dankas vin pro via subteno en la pasinta jaro, petas vian daŭran abonon de EPC kaj petas vin varbi por ni multajn novajn abonantojn. ■



# "ELHAŬTIĜU, KROKODILOJ!"

de SUN AIJUN

**C**E la marbordo de la malgranda japana urbo Okayama, bela, kvieta kaj varmega, okazis la 15-a Komuna Seminario (KS), internacia kunveno de junaj esperantistoj en la orientazia regiono. Ekde 1995 KS estis kunorganizata de la Korea Esperanto-Junularo, Japana Esperanto-Junularo kaj Ĉina Junulara Esperanto-Asocio. Somere de 1996 ĝi okazis en Japanio.

Fakte, en la lasta somero, aŭ pro sunumo aŭ pro kuraĝo elhaŭtiĝis preskaŭ ĉiuj, precipe la krokodilemaj komencantoj, kiuj konsistigis plejparton de la partoprenantoj. Kial pro kuraĝo? KS komenciĝis kiel seminario kun prelegoj kaj fakkunsidoj, sed poste pli kaj pli akcentis instigon de la komencantoj al internacia bablado en kaj amikiĝo per Esperanto. Tial, per la temo "Elhaŭtiĝu, krokodiloj!" la organizantoj emfazis tiun funkcion de KS, ke tie oni ekkonas la plezuron uzi Esperanton internacie.

La "veteranoj" devis paroligi kaj kuraĝigi la komencantojn, kaj du lertaj instruistoj invititaj donis al la komencantoj lecionojn. La humura 54-jara franca samideano Andre Grossmann estis ofte ĉirkaŭita de dekelkaj diligentaj lernantoj kun vortaro kaj skribilo en la mano. Ankaŭ vaganta instruisto s-ro Atilio Orellana Rojas el Argentino venis je la lasta tago de la KS. Dank' al helpo de la instruistoj kaj tri-taga kunvivado kun samideanoj el Japanio, Koreio, Ĉinio, Francio, Pollando, Finnlando, Belgio kaj Argentino, la komencantoj iom post iom komprenis sin reciproke kaj kuraĝe malfermis la buŝon por fari respondon kaj demandon. "Krokodiloj" sukcese elhaŭtiĝis en la KS.

La KS ĉiam disponis kelkajn kunsideojn por leciono por komencantoj, interparolo, raporto pri informoj de Pollando kaj Ĉinio, kartoludo, ludo de vortenigmo, diskuto pri rilathistorio inter la landoj de la ĉeestantoj. La KS-anoj laŭplaĉe partoprenis kunsidon kaj ekskurson. Ni ankaŭ pasigis agrablajn horojn en la vasta maraĝejo, 100 metrojn for de la seminariejo, kaj najbara monto, sur kiu ni havis panoraman vidon al la urbo.

Kiel ununura partoprenanto el Ĉinio kaj raportistino de "El Popola Ĉinio", mi volonte respondis la demandojn pri Ĉinio. Mi faris raporton pri la ĉina E-movado, pri junaj ĉinaj esperantistoj kaj pri "El Popola Ĉinio". Ĉiuj legis la revuon, sed ili opiniis ĝin tre serioza speciale por junuloj. Mi diris al ili, ke en 1997 aperos nova rubriko "Junularo", kiu eble interesos ilin. Mi kore dankis tiujn, kiuj subtenis la ĉinan E-movadon per sia abono.

En la interkona vespero mi renkontiĝis kun sep malnovaj geamikoj, kiuj partoprenis la 14-an KS en Tianjin (Tjanĝin), Ĉinio, en 1995. Kune naĝante en la maro, bruligante krakfajraĵon ĉe la marbordo kaj prezentante kanton, dancon kaj teatraĵon vespere, mi tuj amikiĝis kun aliaj 40 gejunuloj. Kvankam oni malpermesis maldormadon, tamen kelkaj el ni elŝteliĝis al la marbordo, kuŝis sur flosboato, rigardis la lampoĉenon de la malproksima insulo Shikoku kaj babiladis ĝis profunda nokto.

La intima kunloĝado neforgeseble impresis min. Mi esperas, ke ni renkontiĝos en la venonta KS en Koreio. ■



KS-anoj ĉe maro


**O**NI ofte aŭdas, ke la venonta jarcento estos la jarcento de Azio. Ekonomie, Azio progresas kaj verŝajne estos gvidanta monda forto en la 21-a jarcento. Pro tio, Usono kaj aliaj landoj en Ameriko deziras kunprosperi kun aziaj landoj en la nomo de la Azia-Pacifika Ekonomia Kooperado kaj estroj de eŭropaj landoj deziras kunprosperi en la nomo de la Azia-Eŭropa Renkontiĝo. Ŝajnas, ke la tuta mondo jam agnoskas, ke la 21-a jarcento estos la epoko de Azio, sed nur en ekonomio.

Sed la plej granda malforto de Azio por ludi la gvidantan rolon en la mondo estas lingvo. Sub la nuna internacia lingva ordo, Azio ne kapablos esti gvidanta forto nek kunlaboranta forto, sed sekvanto de lingve fortaj landoj.

Ni nun loĝas en la moderna mondo, kiu postulas demokration, justecon, egalecon, liberecon kaj homajn rajtojn. Veraj demokratio kaj egaleco inkluzivas lingvajn demokration kaj liberecon, kaj veraj egaleco kaj homaj rajtoj inkluzivas lingvajn rajtojn. Pro tio, ĉiuj internaciaj deklaroj aŭ ĉartoj de internaciaj organizaĵoj, inkluzive la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, malpermesas diskriminacion de homoj surbaze de, i.a., lingvo. UN dum la pasintaj 50 jaroj kontribuis multe por la bono de fizike malfortaj homoj, sed ne povis kontribui por la lingvaj rajtoj de lingve malfortaj nacioj.

La mondo estas regata de politike fortaj naciaj lingvoj, kaj landaj reprezentantoj aŭ deputitoj al internaciaj organizaĵoj ne povas paroli en siaj naciaj lingvoj, sed en politike fortaj naciaj lingvoj postulataj de la politika forto.

Limigo de internacia komunikado en unu aŭ kelkaj naciaj lingvoj ne nur malhelpas lingve egalan kaj demokratian komunikadon kaj elpostulas kulturalan invadon, sed ankaŭ kaŭzas malprogreson kaj malevoluon de na-



Prof. Lee Chong-Yeong en la Unua Azia Kongreso de Esperanto

LEE CHONG-YEONG:

## Prospektivo al internac

ciaj lingvoj kaj kulturoj.

La nuna internacia lingva ordo ne nur ne kapablas ŝanĝi la malboniĝantajn lingvajn rajtojn, sed male ĝi akcelas la malprogreson. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progreso en la komunikadotekniko, nek malkovro de novaj metodoj de lingva instruado aŭ tradukado ŝanĝos la tendencon.

La mondo bezonas novan internacian lingvan ordon (NILO). En NILO ĉiuj homoj uzos neŭtralan internacian komunan helplingvon por internacia komunikado. Sub NILO, la homaro povos krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povos pace kaj frate interkomunikigi, ne altrudante siajn gentajn apartaĵojn. NILO garantios lingvajn rajtojn kaj internacian demokratian komunikadon, faciligos lingvan diversecon kaj transnacian edukadon kaj kontribuos al la homa emancipiĝo el la komunika-

da problemo. Sub NILO, la lingva diverseco ne dividos la popolojn sed unuigos ilin.

Nun internaciaj organizaĵoj serioze alfrontas la lingvan problemon. La Eŭropa Unio nun uzas 11 lingvojn kiel oficialajn lingvojn, kaj ĉiuj oficialaj paroladoj kaj dokumentoj devas esti tradukitaj en 11 lingvojn. Preskaŭ duono de la buĝeto estas por la lingva servo. Pro tio, 83 anoj (14%) de la 627-kapa Eŭropa Parlamento "pli-malpli" favoras la uzon de Esperanto kiel internacia helplingvo. UN nun serioze studas kiel plibonigi sian funkciadon kaj spari elspezon. Jam estas proponite al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, ke ĝi adoptu tagordon ĉe sia venontjara asembleo, por diskuti "internacian helplingvon". Aldone al 6 oficialaj lingvoj (angla, franca, rusa, ĉina, hispana kaj araba) uzataj en UN, ĉiuj oficialaj dokumentoj estas tradukitaj en la germanan lingvon pagite de Germanio kaj Aŭstrio.





Prof. Lee Chong-Yeong kaj aziaj samideanoj

# la nova ia lingva ordo

Verŝajne Japanio baldaŭ faros similan aranĝon kun UN.

Aŭguste de 1996 la Ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj decidis, ke ekde septembro ĝi okazigos gazetaran konferencon nur en la ĉina lingvo, sen anglalingva traduko. La decido estis laŭdita de *Renmin Ribao*, la organo de la Komunista Partio de Ĉinio, kiel la signo, ke Ĉinio estas fariĝanta forta nacio. La ĵurnalo diris en sia redaktora artikolo: "La pozicio de Ĉinio en la internacia scenejo estas altiĝanta ĉiutage, kaj la ĉina lingvo fariĝas tre influema lingvo en la mondo... Kiam iu nacio estas respektata internacie, estas nature, ke ankaŭ ĝia lingvo estas respektata." Aliflanke, en Eŭropo, dum la lasta milita ekzerco de NATO, la lingva problemo kaŭzis malefikan rezulton. Pro tio estas propono, ke la angla lingvo estu uzata kiel komuna lingvo por la militaj ekzercoj de NATO. Tiaj problemoj jam indikas al ni la kaosan situacion en la internacia lingva ordo. Tempo pli

kaj pli maturiĝas por ŝanĝi la internacian lingvan ordon.

D-ro Nitobe Inazo, Asista Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, jam en 1921 klopodis konstrui novan internacian lingvan ordon. Jam en 1926, s-ro Kijomi Rokuroo skribis al "la Revuo Orienta", ke Esperanto estu komuna lingvo por azianoj, speciala por komunikado de koreoj kun japanoj. Ni povas diri la samon al ĉinoj.

La esprimo de dediĉo de Esperantujo al la konstruado de NILO estas la baza etoso de la Manifesto de Prago, proklamita de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj la Kongresa Rezolucio invitis ĉiujn internaciajn organizojn kaj lingvopolitikajn instancojn al kunlaboro kun la internacia Esperanto-movado por la konstruado de "pli justa kaj demokratia lingva ordo". La Komitato de UEA aprobis lanĉon de kampanjo, kiu celas levi la prestiĝon de la

internacia lingvo, precipe ĉe decidopovaj homoj kaj instancoj, kaj konsciigi internaciajn organizojn pri la praktikaj eblecoj, kiujn prezentas la internacia lingvo, kaj la Komitato alvokis la landajn kaj fakajn asociojn de Esperanto-komunumo pretigi al la intensaj fortostreĉoj por komune antaŭenporti la internacian lingvon al tiu pli firma pozicio en la mondo dum la venonta jarcento, kiun Esperanto meritas kaj kiu ŝajnas nun atingebla.

Tamen, ni bone scias la politikan realon de la internacia lingva mondo. Ni devas racie analizi la realon, amikece persvadi koncernajn organizaĵojn kaj paŝon post paŝo fortigi politikan subtenon. Ni intencas apelacii al Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Parlamento por instigi ilin studi kaj diskuti internacian helplingvon, kaj provinstrui kaj provuzi Esperanton kiel la internacian helplingvon. Ni bezonas aktivan subtenon kaj partoprenon de ĉiuj esperantistoj al la kampanjo. Jen estas miaj specifaj petoj al la unuopaj esperantistoj, landaj asocioj, fakaj asocioj de UEA kaj ankaŭ aliaj Esperanto-organizaĵoj, radioj kaj ĵurnaloj, kiuj sendepende agadas:

— skribu kaj informu al nacilingvaj amaskomunikiloj pri la Manifesto de Prago, la Kongresa Rezolucio, kaj la koncepto, bezono kaj ebleco de NILO.

— skribu al viaj landaj reprezentantoj al UN kaj viaj deputitoj al Eŭropa Parlamento pri la bezono kaj praktika ebleco de internacia helplingvo kaj petu subteni la proponon studi, provuzi kaj provinstrui Esperanton kiel internacian pontlingvon.

Se ni konsideras la kreskantan premon de tiuj internaciaj organizaĵoj pro la lingva problemo, NILO ŝajnas akceptenda.

Azianoj estu pioniroj de la konstruado de NILO, kiu ŝajnas atingebla! Tio ĉi estas la fierinda misio de la aziaj esperantistoj en la 21-a jarcento! ■

# Interesa renkontiĝo de esperantistaj familioj

**K**ELKAJN tagojn post la 81-a UK en Prago mi rapidis al la slovakaj ĉefurbo Bratislava, kie mi malfruis al la 18-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF).

La 18-a REF, organizita de la familio Reinvar



La aŭtoro (meze), Fabiano Corsetti (dekstre) kaj ties frato



Infanoj kaj plenkreskuloj en la REF

nome de la Rondo Familia de UEA, kunlabore kun esperantistoj de la Ago-grupo ĉe la Slovaka AIS, okazis inter la 27-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 1996 en la Junulara Hejmo de Bratislava, kun partopreno de 26 esperantistaj familioj el Britio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Pollando, Slovakio kaj aliaj sep landoj. El la 35 Esperanto-parolantaj infanoj en la REF la plej aĝa estis 16-jara kaj la plej juna nur 3-jara.

Ĉiun matenon la plenkreskuloj kune kun la in-

fanoj kantadis slovakajn popolkantojn kaj amuzajn kantojn en Esperanto. Jen unu el la slovakaj popolkantoj:

*Unu rozo, du rozoj  
Turhorloĝ' en Trenĉin  
Pluvas, pluvas  
Mi ankoraŭ, mi ankoraŭ  
Knab', ne trinku ĉi akvaĉon  
Jupojn sepdek ja ŝi havis  
Ĉe la urbo Levoĉa  
Mariŝa*

Iun matenon mi estis inter ili kaj kantadis laŭ la takto. Mi dividis ilian ĝojon kaj sentis min multe pli juna. Neniam antaŭe mi vidis tiom multe da infanoj kune sin distrantaj plurajn horojn per Esperantaj kantoj.

Plejparto de ili estis denaskaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis la 11-jara itala knabo Fabiano Corsetti. Tuj post sia alveno al la REF li skribis en sia taglibro:

*Hodiaŭ estas mia unua tago en la REF. En la mateno ni kantis kaj en la posttagmezo unue ni iris sur boato trans la riveron Danubo kaj poste ni iris en restoracion sur la supro de tre alta turo (80 m).*

Jes, jam en la unua tago la REF-anoj ekskursis al la urbo. Ili ŝipveturis sur Danubo, promenis tra parko kaj vizitis restoracion en la ponto-turo, kie ili havis panoraman vidon al la urbo.

Iun posttagmezon la REF-anoj iris al arbara parko, kie ili havis piknikon kaj bruligis tendarfajron vespere. Ili gaje ludadis kaj kantadis ĝis nokto vualis.

La infanoj kaj plenkreskuloj en la REF ĝuis ankaŭ aliajn interesajn programerojn, kiel manlaboroj, desegnado, dancado kaj sportaj konkursoj.

La 18-a REF finiĝis per familia prezentado kaj dancmuziko.

La aktivado de esperantistaj familioj impresas min tiel profunde, ke ĝi de tempo al tempo okupis miajn pensojn. En la infanoj Esperanto-parolantaj mi vidis la estontecon de nia movado. La sukcesa apliko de Esperanto fare de iliaj gepatroj al la familia vivo estas ekzemplo por multaj aliaj. Oni atendas, ke ankaŭ ĉi tiuj partoprenu la venontan REF kun junaj Esperanto-parolantoj. ■



## Maldungo

(Prozaĵo)

de PENTTI TÖRMÄLÄ (Finnlando)

**T**IE ili nun sidis sur iuj legere remburitaj seĝoj, kun seriozaj mienoj de jam pli maljunaj homoj, precipe pli ol kvindekjaraj. La ĉambro estis mezgranda fabrika ĉambro, unu el la kontoraj, kiuj etendiĝis ĝis la enira fino de la ladhalo nur kelkajn jarojn malnova. Ĉiu estis aparte vokita laŭ ĝenerala maldunga projekto planita ie en la kontoraj ĉambroj, kiuj kaŝis en si la fabrikan estraron, konsistantan el la ĉefoj kaj la laborestroj diversnomitaj laŭ siaj oficoj.

La fabrika laborĉefo prenis unuan parolvicon, post kiam li estis atentinta, ke ĉiuj vokitoj jam sidis sur siaj seĝoj. Li klarigis formale la fabrikan produktan situacion kun la merkata situacio en internacia sportŝua merkato, laŭ kiu li montris, ke la fabriko estas devigita malmultigi kaj transigi al aliaj landoj siajn produktojn. "Ni ne povas konkurenci per ĉi tiuj produktaj kostoj kun la internaciaj malpli altaj prezoj," akcentis la juna laborĉefo la situacion, laŭ li relative sombran. "La sola rimedo estas, ke ni malaltigu la produktajn kostojn!" akcentis li jam iom pli forttone kun ia memcerteco pri sia temo, kvankam li sentis sin malgranda buĉisto buĉanta iun malgrandan beston: kokinon, anason, kuniklon aŭ alian...

La vokitoj rajtis fari iujn priklarigajn demandojn pri la temo nun ŝarĝanta iliajn pensojn forte. La laboreca situacio en la regiono ankoraŭ favoris, sed la aĝa situacio malfavoris jam preskaŭ ĉiun el ili. Ili estis kvindekjaraj, kaj la kvindekjaraj ne plu estas favorataj sur labormerkatoj okcidentlandaj... La situacio estis malcerta precipe pro tio, ke ĉiuj posedis familiojn, kiuj tamen ankoraŭ bezonis plugajnojn, ofte havigitajn de la edzino...

La konversacio finiĝis. Ĉio, kion oni devis diri, estis aŭ jam demandita, aŭ jam respondita. Nun vicis la dokumenta disdonado pri la maldungoj fine atingotaj aŭ somere, aŭ aŭtune laŭ ĉies laborperiodo longa nur monatojn, aŭ jarojn, eĉ pli ol dek jarojn... La slipo estis malgranda, ŝparanta la firmaan paperon. Ĉu pro kareco aŭ nur pro la ĝenerala firmaa ŝpareco?

Sekve tio estis atingita... Ili estis nun maldun-

gitaj, laborantaj plu nur certajn semajnojn ĉe siaj laborpostenoj. La halaj fenestroj estis altaj. Oni ne povis atingi rektajn vidkontaktojn kun la ĉirkaŭa medio fabrika. En la ladaj muroj bluetis la koloro iel mildigante la laborpostenajn situaciojn, kiujn nun depresiigis iel la atendotaj finsalajroj. Ne plu estis ĉe ili la voloj fari ĉion plej bone, rapide kaj eĉ pli multe ol nur siajn necesajn laborojn...

Iam ili ŝercis kaj ridetis, iel celante forgesi la atendotajn finsalajrojn. Tio estis la celo venki tion, kio estis preskaŭ definitive atendota — ĉu en la somera tago, ĉu en la frua aŭtuno, dum la foliarboj jam sin preparas por la venonta malmilda vintro... Sed pro la situacio, la ŝercoj kaj la ridetoj plejparte nur kulis la situacion pli kaj pli malgajan, malcertan kaj strangan al tiuj, kiuj estis kutimintaj regule labori ĉiutage laŭ la laborsemajnoj...

La bluaj muroj ne komprenis la situacion. Ili nur staris rekte, vertikale — iel, kiel barante ion al iuj... La fabrikaj maŝinoj bruis kaj bruegis — por kiuj kaj kial...? Ofte la tristo alvenis al la maldunginformitoj. La atendo streĉis la menson... La lasta somero ĉi tie...

## Otto, finna senlaborulo

(Prozaĵo)

de PENTTI TÖRMÄLÄ (Finnlando)

**L**A vivado en la okcidentaj industriaj demokratioj ofte ne estas tia surtera paradizo, kiel homoj en aliaj landoj supozas... Ĉi tie mi rakontas pri iu viro, senlaborulo, kies sorto — kvankam okazinta jam antaŭ dekoj da jaroj — tion montras... Mi konis lin — nun verŝajne jam antaŭlonge modeste entombigitan...

Pasis somero, komenciĝis jam aŭtunaj monatoj. Otto, jam relative maljuna viro, dum la tuta somero ne estis havinta salajritan laboron. Anstataŭ tio, li devis ion fari por havigi al si necesan monon — ne nur por si, sed ankaŭ por sia edzino. Feliĉe, Otto ne estis maldiligenta aŭ malkapabla viro. Per liaj manoj formiĝis utilaj branĉaj balailoj kaj saŭnaj kvastoj (uzataj de finnoj, kiuj kutimas frapadi sin, lavante sin en saŭno). Per tiaj malgrandaj mongajnoj Otto aĉetis modestan nutraĵon kaj tabakon kaj pagis sian lupagon — nature parton el ĉi tio uzis ankaŭ lia edzino.

Sed venis la aŭtunaj monatoj. La naturo ne plu tiel verdiŝ, kiel dum la someraj tagoj. Estis veninta

# IpI informas interlingvistojn kaj esperantologojn

En Esperanto kaj diversaj naciaj lingvoj aperas pli kaj pli multe da ofte malfacile trovebla scienca materialo pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, gravaj por sciencaj studoj kaj esploroj.

Seriozaj interlingvistoj kaj esperantologoj klopodas sekvi la fakan literaturon. Tion grave faciligas *Informilo por Interlingvistoj* (IpI), kiun eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). La aktuala (tria) serio startis en 1992. Aperis ĝis meze de 1996 entute 17 numeroj kun sume 156 paĝoj, plenaj de utilaj informoj, plejparte bibliografiaj.

IpI estas abonebla ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Jarabono por tri 16-paĝaj A5-formataj kajeroj kostas 10 guldenojn (por EU-landoj 10,60 gld.). Estas ankoraŭ riceveblaj ankaŭ la jarkolektoj 1992-1995 (po 10 gld.). Seriozaj interesitoj el landoj kun transpagaj problemoj povas laŭpete ricevi IpI senpage.

*Informilo por Interlingvistoj* estas redaktata de d-ro Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio), kiu volonte akceptas materialojn pri ĉiuspecaj interlingvistikaj aktivecoj, projektoj kaj publikaĵoj.

la deverda sezono, dum kiu la naturo ŝanĝas sian koloron de la verdaj tonoj al la flavaj, brunaj, ruĝaj kaj eĉ al la grizaj kaj nigraj... Otto estis plu sen salajrlaboro, al kiu eĉ plej modesta li estis preta...

Dum sia irado li estis jam rimarkinta, ke vakciniaj beroj iom post iom komencas ruĝigi. En iu tago li decidis iri al iu arbaro por vakciniaj beroj. La edzino iam volis nei: "Ĉu tie jam estas la maturaj? Ĉu vi ne eraros en tiu vasta arbaro? Ĉu vi havas sufiĉe da korboj?..." Sed Otto estis decidinta iri al la arbaro. Devigis lin ankaŭ la streĉa monmanko, kion li ne menciis al sia edzino, por ne timigi ŝin.

Otto paŝadis kelkajn kilometrojn kun salika korbo ĉe sia alia mano. Li supozis, ke ĝi sufiĉas, ĉar nur parto ŝajne estis matura.


La korbo estis jam plena de vakciniaj beroj. Sed restis ankoraŭ multe da beroj. Kion fari? Otto memoris aferon, kiu okazis en lia infaneco: foje la berkorbo de lia patro estis plenplena. Lia patro demetis sian kalsonon, nodis la kalsontubojn kaj kolektis la berojn en ĝin. Ĉu li faru la samon? Li hezitis momenton precipe tial, ke li volis vendi la berojn, sed la monmanko venkis: li devus ricevi monon por la nutraĵo kaj tabako kaj en la venonta tago por la lupago...

Otto faris la samon. Li kolektis multajn litrojn — eble eĉ dek. Li ricevus sufiĉe da mono ĉe la vendoj — se en lia vivo iam estis sufiĉe...

La viro revenis malfrue al la hejmo, kie la

edzino estis jam timinta la eraron en la granda arbaro. La pakaĵo surprizis la virinon. Kion pensus la homoj, se ili vidus tion? Sed la viro iel indiferenta. Lin persekutis la monmanko, kiu devigas homon fari kion ajn. ■

**Por finnlingvanoj la aŭtoro ofertas pri ĉi tiaj temoj ankaŭ la poeman antologion "Irtisanottujen Istunto" kun verkoj de 36 geaŭtoroj. Skribu al: Pentti Törmälä, Domargard, Fin-06100 Porvoo, Finnlando.**



Urĝa savo

Karikaturo de Feng Guibo

**CINIO**

● La 6-an de oktobro 1996 la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio okazigis ago-tagon de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 30 esperantistoj. En la kunveno oni diskutis pri plano de E-aktivado por 1997. En la kunvenejo oni ekspoziciis pli ol 100 fotojn pri E-aktivado, faritajn de simpatianto de Esperanto kaj fotografa amato s-ro Li Yan dum la lastaj dek jaroj. (Sun Aijun)



**S-ro Heinz Schindler el Germanio prelegas en la konferenco.**

● La 2-7-an de septembro 1996 okazis en Pekino la 5-a Internacia Akademia Konferenco pri Sciencoj kaj Tekniko en Esperanto, invitita de la Sciencista-teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Scienco. Pli ol 500 esperantistoj el Francio, Germanio, Pollando kaj Ĉinio partoprenis la konferencon. La 6-a konferenco okazos en 1998. (Yin Qin)

● La 17-an kaj la 18-an de aŭgusto 1996 la Hubei-a E-Asocio okazigis en Wuhan, ĉefurbo de Hubei-provinco, seminarion de kulturo kaj instruado de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 20 personoj. En ĝi prelegis ges-anoj Shi Chengtai, Hu Guozhu, Zhang Danchen, Li Yuping kaj Lu Jixin. Dume oni inaŭguris Esperantomon de Donghu, Hubei-

provinco. (Peng Zhengming)

● Por memori pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto, la Ŝanhaja Poŝtmarka Kompanio faris memorkoverton kun memoriga poŝtstampo en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampo estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linfuj). (Shen Xiaoxi)

● En junio kaj julio 1996 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn "La Infana Vivo", "Centjara Jubileo de Olimpikoj kaj la 26-aj Olimpikoj", "Ŝparu la Teron", "La Ruinoj de la Gubernatorejo kaj Zhenwu-pavilono", "La Ĉina Aŭtomobilo", "Rekonstruita Nova Urbo Tangshan post Sismego". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj

memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui. (Zhang Linrui)

**POLLANDO**

● Lastjara Freŝo '96 okazis la 27-30-an de junio en Olŝtino, Pollando. Partoprenis preskaŭ 40 geesperantistoj el la norda

Pollando kaj granda grupo el Germanio. La unuan premion, kiu valoris ĉ. 600 usonajn dolarojn, gajnis blindulino el Olŝtino s-ino Irena Lowinska. Kelkaj aliaj ĉeestantoj de la Granda Kvizo

gajnis ankaŭ monpremiojn kaj albumojn, librojn, dolĉaĵojn kaj jarabonojn de E-revuoj.

Dum Freŝo '97 la unua premio valoros 1 000 usonajn dolarojn. Ankaŭ la postaj premioj estos valoraj. Se vi volus gajni monpremion, viziti olŝtinajn ĉirkaŭaĵojn, partopreni brulligaron kaj konatiĝi kun olŝtinaj esperantistoj, skribu kaj petu informojn al prezidanto de E-klubo: S-ro Andrzej Gielert, skrytka 861, Murzynowskiego 22/27, Olsztyn, Pollando. (Marian Zdankowski)


**SERBIO**

● Kio estas ELSR? ELSR estas mallongigo de Esperanto-Ligo de Serba Respubliko, kiu fondiĝis la 23-an de marto 1996. Celo de ELSR estas disvastigi praktikan uzadon de la internacia lingvo Esperanto, plifaciligi la ĉiusecajn spiritalajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj malgraŭ diferenco de raso, nacio, religio, politiko, sekso, kulturo aŭ lingvo. Ĉiuj, kiuj deziras kontaktiĝi kun ELSR, skribu al: Esperanto-Ligo de Serba Respubliko, Poŝtkesto 335, YU-78001 Banja Luka, Serba Respubliko. (ELSR)

**AŬSTRALIO**

● En Perth estas fonduso starigita de s-ino Einihovici, kiu donas salajron por unu instruisto, kaj tri privataj lernejoj

**Partoprenantoj de Esp-kurso en Perth**





# Edifo de blindulo

de LI JIATONG

akceptis Esperanton en la kadro de "eksterplanaj temoj", du aranĝis instruadon al ĉiuj lernejoj, la tria (la plej granda) nur al libervoluloj. Ekde februaro 1996 proksimume 220 infanoj, 3-12-jaraj, ricevis instruadon unu fojon semajne. Ĉe la plej junaj la lecionoj daŭris nur 15-20 minutojn, ĉe la plej aĝaj 30. S-ro Trevor Steele instruis ilin. El la sama fonduso venis mono por sendi unu lernejon kaj patr(in)on al la Infana Kongreso apud Prago.

## FRANCIO

● Vinilkosmo-kompil' Vol. 2 estis produktita ne nur per helpo de ĉiuj muzikgrupoj, de ĉiuj antaŭaĉetintoj, de Studio Stansy Production, sed ankaŭ per la financa helpo de Eŭropa Junulara Fonduso (tra TEJO), Fondaĵo Carson (Kanado) kaj Fame Fondaĵo (Germanio). Prezo: Por KD (Kompakta Disko): 120 FRF, 39 NLG, 24 IRK (Internaciaj Respond-Kuponoj); Por KS (Kasedo): 70 FRF, 23 NLG, 14 IRK. Ĝi mendeblas ĉe: Eurokka, Esperanto-Rok-Asocio, FR-31450 Donneville, Francio.

(Floreal Martorell)

## HUNGARIO

● La 14-a Ĝenerala Konferenco de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) okazos la 17-19-an de majo 1997 en Hungario en Kulturdomo "Lang". La partoprenkotizo: 60 USD. depende de la inflacio (inkluzivas 2 tranoktojn, manĝaĵojn aktualajn kaj ceterajn). Aliĝo kaj pluaj informoj: E Movilo. Budapest, Nyirpalota u. 107. H-1157. La lasta aliĝdato: la 31-a de marto 1997. (Imre Pethes)

**M**I studis en fremda lando. Foje mi veturis trajne kaj rimarkis, ke mia najbara maljunulo estas blindulo.

Ĉar mia instruisto, kiu gvidis min por doktoriĝa disertaĵo, estis blindulo, tial senĝene mi babilis kun la maljunulo kaj donis al li varman kafon.

Ĉar tiam okazis rasa ribelo, ni parolis pri rasa diskriminacio.

De infanaĝo li opiniis, ke nigrulo estas humila. La servisto de lia familio estis nigrulo. Li neniam manĝis kaj lernis kune kun nigrulo. Foje li estis komisiita de siaj samklasanoj aranĝi piknikon. Li eĉ substrekis sur la invitiloj: "Ni rajtas rifuzi iun ajn." Tio signifas "Ni ne bonvenigas nigrulon" kaj konsternis la samklasanojn.

En iuj vendejoj servis nigruloj. Li ĉiam metis monon sur vendotablon por pago, tiel ke li povis eviti kontakton de iliaj manoj.

"Vi ne edziĝis al nigrulino?" mi demandis.

"Mi ne havis rilaton kun nigruloj, kiel edziĝi al nigrulino? Mi opiniis, ke se nigrulo kaj blankulo

geedziĝis, tio senhonoris la gepatrojn de la blankulo," li ridegis.

Tamen kiam li studis post diplomigo, okazis al li trafika akcidento. Kvankam li transvivis la dangeron, tamen li perdis la vidkapablon. Li eniris en blindulejon, kie li lernis brajlon kaj iradon kun kano. Iom post iom li povis vivi sendepende.

Li diris: "La plej granda ĉagreno por mi estis ke mi ne povis certigi, ĉu oni estas nigra aŭ ne. Mi konsultis mian psikologian instruiston. Li donis al mi utilajn konsilojn. Mi fidis lin, verŝis al li mian koron kaj rigardis lin kiel mentoron kaj amikon. Iutage li diris al mi, ke li mem estas nigrulo. Kaj tiam malaperis miaj antaŭjuĝoj. Por mi la instruisto estas bonulo, kaj la haŭtkoloro estas sen-signifa."

Antaŭ ol la trajno atingis la stacion, la maljunulo diris: "Mi perdis ne nur la vidpovon, sed ankaŭ la antaŭjuĝojn. Kia feliĉo!"

La edzino de la maljunulo jam atendis lin sur ia kajo. Ili brakumis unu la alian. Mi mire rimarkis, ke lia edzino estas blankhara nigrulino. ■



# La dua familio de ŝuistoj

de SUN AIJUN

*En miaregionaj periodaĵoj mialandaj... ŝuindustriistoj brue furiozis kontraŭ la ĉipaj prezoj de ŝuoj importitaj el Ĉinio. Ili asertis, ke vialandaj laboristoj, plejparte geknaboj, devis labori kvazaŭ sklavo, dormi surplanke kaj nutri sin per manĝaĵoj komunaj al dombestoj. Bonvolu iam raporti, sen "ŝminkaĵo", kiel vivas laboristoj en viaj ŝufabrikaĵoj.*

GEORGE O. VASKE (Brazilo)



En laborejo de ŝudorsoj

**E**STIS dekminuta intertempo. La 300 stebmaŝinoj en la ŝudorsa laborejo ĉesigis sian ritman funkciadon. Ankaŭ f-ino Xia Hongwei (Ŝja Hongŭej), 21-jara, ĉesigis sian laboron. Al ŝi tuj venis kelkaj knabinoj kaj ekbabilis kun ŝi. Sur la stebmaŝinoj amasiĝis blankaj ŝudorsoj kun blua randaĵo, kiujn ili stebis per siaj

lertaj manoj.

Estis somere. La suno rostis ekstere, tamen en la laborejo estis malvarmete. Jen kial oni ne eliris ripozi. Mi demandis Xia: "Kiom da jaroj vi ĉi tie laboris?" Ŝiaj kamaradinoj konkure respondis anstataŭ ŝi: "Ŝi ĉi tie laboris 3 jarojn. Dank' al siaj lertaj manoj, ŝi jam faras la 'superan laboron', t.e. fiksi

lokon por lango de ŝuo kaj alkudri ĝin al ŝudorso, laboron alte salajratan kaj malfacile faratan." Xia Hongwei venis el kamparo de Shandong-provinco. Fininte studon en mezlernejo, ŝi eklaboris en la ŝufabriko Shuangxing (Ŝuangŝing) kaj kontraktis kun ĝi pri 5-jara servo.

"Miaj gepatroj, laborantaj sur

la kampo, ja portis la ŝuojn faritajn de la ŝufabriko Shuangxing. Mi fieras, ke mi povas labori en ĝi. Ne estas malfacila por mi la laboro. Mia ĉiutaga tasko estas alku-dri ŝulandon al 580 paroj da ŝuoj, kaj mi ofte superplenumis ĝin je 100 paroj. Mia monata salajro estas 500 juanoj (8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro), escepte de la plia enspezo pro la superplenumita laboro," diris Xia Hongwei.

Iu apud-staranta diketa f-ino aldonis: "Mi lukras malpli multe ol ŝi, tamen la enspezo sufiĉas por



**Xiao Hou (meze) en laboro**

mi, ĉar la prezaro estas malalta. La fabriko senpage liveras al ni, alilokaj laboristinoj, loĝejon, kaj al ĉiuj tagmanĝon. Ĉiumonate mi povas ŝpari 300 juanojn, dekalkulate de la elspezo por vespermanĝo, vestaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj."

Mi demandis, por kio ili ŝparas monon. La fraŭlinoj ridetis, ĉar la kaŭzoj estas malsamaj. Xia Hongwei havas mutan fraton kaj ŝi ofte sendas monon al li. Krome, ŝi pagas por lerni frizi kaj tajlori, por poste funkciigi butikon en sia hejmloko. Tio postulos 10 000-20 000 juanojn. Tial ŝi neniam malŝparas monon.

Aŭskultinte la korverŝon de la fraŭlinoj, estrino de la laborejo Lao Sun aldonis: "Kiam mi eklaboris en la fabriko antaŭ 20 jaroj, mi, samkiel la ĉ. 20-jaraj gejunuloj, stebis en ĉen-laboro. Tiam la fabri-

ko estis nur metiejo de kaŭĉukaj ŝuoj. En la lastaj jaroj la ŝufabriko Shuangxing faris grandajn progresojn kaj ĝiaj laborkondiĉoj estas multe pli bonaj ol antaŭe. Mi bone konas la knabinojn, ĉar mi iris la similan vojon. Ili volas pli multe lukri, dum ili estas junaj. Ili ŝparas monon por helpi sian familion kaj ankaŭ por sia doto."

Kiam oni menciis doton, la silentema Wang Xinyan (Ŭang Ŝin-jan) ruĝiĝis en la vizaĝo. Ŝi, 24-jara, ĵus kontraktis kun la fabriko pri 5-jara servo. En ŝia hejmloko la samaĝaj virinoj jam havas infanon. "Mi ŝatas mian laboron. Mi ĝoje vivas, ĉar la fabriko havas bonajn laborkondiĉojn kaj la laboro ne estas tre streĉa. Post laboro mi kune kun aliaj knabinoj ludas volanon, vizitas kinejon aŭ ekskursas en semajnfino. Mi ne volas longe vivi en la movoplana urbo kaj deziras nur pli multe lukri, kaj doni monon al mia

fratino por ke ŝi povu lerni en alta lernejo. Krome, mi volas ankaŭ funkciigi butikon, post kiam mi revenos al la hejmo." Wang havas bonan planon pri sia estonteco. Kvankam ŝi ne malkaŝis sian sekreton, mi tamen supozis, ke ŝia fianĉo pacience atendas ŝin en la hejmloko.

Bone konatiginte kun mi, la knabinoj ĝoje fotis sin kune kun mi. Ili scivoleme demandis min pri tio kaj alio. Kiam ili informiĝis, ke mia salajro estas preskaŭ sama kiel la ilia kaj ke mi povis malofte hejmenreveni por viziti miajn gepatrojn, ili preskaŭ sentis kompaton al mi: "Nia fabriko donas al ni vintrajn kaj somerajn feriojn po 2 semajnojn en la jaro, kaj ĉiufoje ĝi veturigas nin per aŭtobuso ĝis la pordo de nia hejmo." Ili invitis min viziti ilian loĝejon post la la-

boro, dirante, ke tie ili povas plene montri sian knabinan intereson.

La ŝufabriko Shuangxing, unu el la multaj fabrikoj de Shuangxing-grupo, ĉiujare produktas 14 milionojn da paroj da ŝuoj por eksporti. Tie funkcias pli ol 1 800 laboristoj, el kiuj 70% estas virinoj, kaj en la steblaborejo laboras laboristinoj ekskluzive. Veninte en la paklaborejon, mi finfine vidis kelkajn junulojn. Ili senhalte pakas la faritajn ŝuojn paro post paro. Junulo Xiao Hou, 26-jara, enkestigas la ŝuojn. Li ofte helpas la knabinojn laborantajn en ĉen-laboro kaj ŝercas kun ili. Li konfesis: "Mi ne estas kolerema kaj oni ŝatas ŝerci kun mi. La mekanika laboro estas interesa en ridado, kaj ni ĝoje pasigas la labortagojn."

En la oratora konkurso okazigita de la fabriko antaŭ nelonge iu nova laboristo deklamis: "Paro da Shuangxing-aj ŝuoj belaj, faras popolan vojaĝon senĝena.' Tiu frazo furoris en pluraj jaroj kaj ĝi forte allogis min, kiam mi estis knabo. En la lasta jaro mi, filo de kamparano, finfine fariĝis nova membro de Shuangxing-grupo. Krom la hejmloko, kie mi naskiĝis kaj kreskis, nun mi havas la duan familion, t.e. Shuangxing."

Kiom granda estas la familio Shuangxing? Ĝi havas historion de pli ol 70 jaroj, 20 000 laboristojn kaj ĉ. 100 membro-unuojn. La grupo posedas kompletan da teknologioj por produkti varme vulkanizitajn, kondensitajn, injektitajn, ledajn kaj tolajn ŝuojn, sume mil specojn de ŝuoj. La kvanto de ĝiaj ŝuoj okupas la unuan lokon en la ĉina merkato de ŝuoj kaj ĝiaj ŝuoj vendiĝas en pli ol 50 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Japanio, Germanio, Taiwan, Hongkong, Meza Oriento, Suda Ameriko kaj Aŭstralio. Ĝi havas dekojn da kompanioj kaj ĉenbutikoj en Ĉinio kaj aliaj landoj. Shuangxing meritas la titolon "magnato de ŝuoj de Ĉinio" kaj strebas por enviciĝi inter la mondfamaj ŝu-markoj. Jen kial la gejunuloj fieras, ke ili estas ĝiaj membroj.



# *Tibeta ŝtonskulpturo elspiranta religiecon*

**C**IE sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo de Ĉinio oni povas senti fortan religiecon kaj tio montriĝas ankaŭ en ĝiaj skulptaĵoj.

La ŝtonskulptaĵoj plejparte estas faritaj de popolaj metiistoj kaj bonzoj de malgrandaj temploj. Ili vidiĝas en temploj, sur montoj, ĉe sanktaj lagoj, vojoj kaj kamprandoj kaj ĉirkaŭ domoj. Kompare kun budhismaj rulpentraĵoj, freskoj kaj skulptaĵoj en grandaj temploj, ili ne estas delikataj, tamen, ebligas vidi la forton de budhismo sur la altebenaĵo kaj la piecon de tibetanoj por ĝi.

En la antikveco pro kulto de la naturo, *ben*-religio okazigis solenan kulton al ĝi ĉiam post tri jaroj. Tiam oni konstruis simplan altaron el ŝtonoj kun postsignoj de tranĉado, simbolo de signoj kaj sorĉvortoj pri brutomortigo por la rito.

El kombino de la kulto de la naturo kun tiu de la Budho kaj bodisatvoj la simpla altaro fariĝis maso aŭ muro el ŝtonoj surhavantaj skulptitajn budhostatuojn, sutrojn kaj sorĉvortojn. La ŝtonskulptaĵoj figuras diversajn diaĵojn de sekreta sekto de lamaismo kaj grandnombre montras anekdotojn de la Budho. Plejparto de la ŝtonskulptaĵoj surhavas sorĉvortojn kaj sutrojn. Ili, linie skulptitaj kaj brile far-

bitaj, donas reliefan efekton kaj elspiras fortan religiecon.

En la templo Heri de Qinghai-provinco najbara al Tibeto estas kvar muroj el ŝtonskulptaĵoj kun sutroj, multaj pecoj kaj blokoj da tiaj ŝtonskulptaĵoj. En ĝi estas 200 000 diversaj pecoj da ŝtonskulptaĵoj. Inter ili la plej granda havas grandecon de tablo-surfaco kaj la plej malgranda — tiun de libro. Sur du el la kvar muroj amasiĝas ŝtonskulptaĵoj kun la tekstoj de sutroj kaj doktrinoj de la budhana libraro Dazangjing kaj tiuj de la sutro Mahaprajnaparami, sume el 200 milionoj da vortoj. Historia libro diras, ke oni komencis la ŝtonskulptadon en la 30-aj jaroj de la nuna jarcento kaj finis ĝin 20 jarojn poste. La maso Jiayang en la templo Jiegu de la provinco estas pli grandioza. Ĝi areis tiom kiom du kaj duona piedpilkaj ludkampoj. 3-metre alta, ĝi konsistas, laŭdire, el 2.5 miliardoj da ŝtonskulptaĵoj.

Sudokcidente de Potalapalaco en Lhasa, ĉefurbo de Tibeto, kuŝas Yaowang-monto, kies rokmura skulptaĵaro estas la plej grandarea, grandnombra kaj enhavoriĉa en Tibeto. Ĉie sur la du-kilometra monto videblas ŝtonskulptaĵoj kun legendaj rakontoj cirkulantaj inter la tibetanoj de miloj da jaroj kaj ankaŭ dekmiloj da statuaroj grandaj kaj malgrandaj, versimilaj

kaj pli modestaj ol freskoj kaj budhismaj rulpentraĵoj en temploj. Rigardante ilin, oni sentas, ke la Budho kvazaŭ vivas kune kun la homoj. Ĉe la piedo de la monto vagantaj metiistoj skulptas sorĉvortojn kaj diversajn budhostatuojn sur ŝtonoj por oferi sian saĝon kaj piecon al la Budho. En skulptado ili sentas, ke ilia animo fariĝas pli kaj pli pura kaj ilia pieco pli kaj pli profunda. Tion sentas neniu alispeca artisto.

La tibetaj ŝtonskulptaĵoj distingiĝas per modesta formo, baroka temo kaj kolora malharmonio.

La modestan formon decidis eble la nealta nivelo de produktado en Tibeto kaj amatora ŝtonskulptado. La barokan kaj eĉ teruran temon rezultigas la doktrinoj de la sekreta sekto, ĉar ĝi pledas por subigi spiritajn kaj materiajn fortojn al siaj adeptoj, helpate de indigno, teruro kaj potenco. Kaj pro tio inter la tibetaj ŝtonskulptaĵoj ne mankas diaĵoj kun terura vizaĝo.

Alia trajto de la tibetaj ŝtonskulptaĵoj estas, ke la budhostatuoj plejparte surhavas ege intensan koloron el naturaj mineraloj kaj vegetaloj. Plejofte oni uzas la blankan, flavan, bluan, ruĝan kaj verdan farbojn. La drasta kontrasto de koloroj, kiu okazas pro miksiĝo de du harmoniaj koloroj kun alia, impresas tre forte sur la senlima altebenaĵo. ■



La fronto de ŝtongravurita sutro



Jiayang-maso




La blanka Jambhala





Statuo de Ŝakjamunio

Ŝtona skulptaĵaro sur Yaowang-monto





## TURISMA LERNADO EN LA HEJMLOKO DE KONFUCEO

La urbo Qufu (Ĉjufu) de Shandong-provinco estis la hejmloko de Konfuceo (551-479 a.K.), granda edukisto kaj fondinto de konfuceanismo en la ĉina historio. Ĝi abundas je antikvaj konstruaĵoj, historiaj restaĵoj kaj lokaj moroj. Pro tio ĝi estas turisma loko de Ĉinio.

En la lastaj jaroj Qufu lanĉis la specialan programon "Turisma lernado en la hejmloko de Konfuceo", kiu estas ŝatata de ĉinaj kaj alilandaj turistoj. En la unua tago la lernantoj-turistoj en malstrikta robo kun longaj manikoj, kian portis la antikvaj ĉinaj konfuceanoj, venas al la loko, kie Konfuceo lektiis siatempe, por partopreni la inaŭguron de la lernado. La ĉefaj lernobjektoj estas la biografio kaj filozofio de Konfuceo, ĉina historio, pentrarto, muziko, *ĉigong-o*, folkloro, ĉina medicino kaj kulinara arto de la familio de Konfuceo. Dum la lernado la lernantoj-turistoj vizitas la templon, arbaron kaj naskolokon de Konfuceo kaj domaron de liaj posteuloj. Krome, ili vizitas ankaŭ la ĉirkaŭajn infangardenojn, hospitalojn kaj vilaĝojn. Fininte la lernadon, ili per antikvecaj ĉevalĉaroj veturas laŭ pado al la Tombo de Konfuceo, kie oni okazigas diplomigan ceremonion.

## SILKAJ OMBRELOJ DE LA OKCIDENTA LAGO

Ĉinaj ombreloj havas historion de pli ol 4 000 jaroj. La plej fama inter ili estas silka ombrelo de la Okcidenta Lago de Hangzhou (Hangĝoŭ), Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco.

La ombrelo de la Okcidenta Lago el belkolora silko, peza je 250 g kaj maldika kiel cikada flugilo, havas ripojn el bambuo, propra al suda Ĉinio. Disvolvite, ĝi prezentas la pejzaĝon de la Okcidenta Lago kaj pentraĵojn pri floroj, birdoj, insektoj kaj bestoj; Volvite, la ripoj reprenas la formon de eleganta bambuo kun nodoj.

Estas dekkelkaj specoj de ombreloj de la Okcidenta Lago, kiaj tiuj pluvoŝirma, sunoŝirma, danca kaj akrobataĵa.

## ESPLORADO SUR LA "TEGMENTO DE LA MONDO"

Tibeto, "tegmento de la mondo", kun siaj apartaj geografia situo kaj latentaj fortoj, estas pli kaj pli atentata de la mondaj scienc-teknikaj rondoj.

La Altebenaja Ekologia Instituto de Tibeto kaj la Internacia Fonduso de Gruoj de Usono kune enketis pri la nombro de la travintrantaj nigrakolaj gruoj kaj faris ekologian statistikon en Tibeto. Ili konstatis, ke la nombro de la nigrakolaj gruoj, kiuj travintris en Tibeto, konsistigas 79% de la totala nombro de tiuj de la mondo. La instituto kaj la Internacia Bestoprotekta Asocio de Usono 4-foje vizitis la dezertan nordtibetan regionon kaj trovis sume 28 300 bestojn unuarange protektatajn de la ŝtato.

Ĉinaj geografoj esploris longatempe en la kanjono de la rivero Yarlung Zangbo kaj elkalkulis, ke la nomita kanjono en Himalajo profundas averaĝe je pli ol 5 000 m, kaj ke ĝia plej granda profundo estas 5 382 m, pli

multe ol la Granda Kanjono de Kolorado, kiu estas rigardata kiel la plej granda kanjono en la mondo.

## MIRINDA SPEKTAKLO DE TERVARMO

En la gubernio Tengchong, Yunnan-provinco, estas pli ol 80 tervarmaj fontoj en spaco de cent km. Krom varmaj kaj bolantaj fontoj, estas ankaŭ tiuj vaporaj, venenaj kaj intermitaj. Iuj ŝprucigas kvazaŭ perlojn, aliaj vaporon kaj triaj bolantaj ondojn.

La venenaj fontoj situas en norda Tengchong. Ofte okazis, ke birdoj mortis trafluginte ilin. Eksperimentado pruvis, ke la de ili ŝprucigita vaporo entenas grandan kvanton da karbona dioksido kaj hidrogena sulfido.

Tengchong distingiĝas per vapora kaj bolanta fontaroj. Tie odoras sulfuro, siblas vaporo kaj lirlas bolanta akvo. Aparte mirindas la bolanta fonto kun diametro de tri m kaj temperaturo de 97°C. La temperaturo pli altas ol la bolpunkto de akvo en la loko. La vaporkolono de la fonto estas grandioza.

## APOTEKO SUR LA STRATO DE ĈINOJ


La apoteko Kangningtang sur la strato de ĉinoj en Londono estas aparte atentata. La apoteko negranda konsistas el unu ĉambro, kie staras ŝrankoj kun ĉinaj medikamentoj, kaj tri kuracejoj. Luo Dinghui, mastro de la apoteko, diplomiĝis el ĉinmedicina instituto de Ĉinio, laboris en ĉina hospitalo kaj venis al Britio antaŭ 13 jaroj. En la lastaj jaroj d-ro Luo per la tradiciaj ĉinaj medicino kaj medikamentoj kuracis dekmilojn da suferantoj de ekzemo, kun efiko rimarkinda. Dank' al lia sukceso, iuj, kiuj dubis pri la ĉina medicino, komencis kunlabori kun li por akiri pli grandan kuracefikon. Oni diris, ke tri hospitaloj en Londono uzas receptojn de d-ro Luo.

La enketo far kvin akupunkturaj kaj moksaj asocioj de Britio montras, ke en Britio laboras 2 000-3 000 registritaj akupunkturistoj kaj moksistoj. Krom doloro, ankaŭ multaj aliaj malsanoj estas kuraceblaj per akupunkturo kaj mokso. Nemalmultaj suferantoj de dermozo, multobla sklerozo, kancero k.a. ricevis akupunkturajn kaj moksajn terapiojn. Iuj akupunkturistoj kaj moksistoj ankaŭ funkciigas ĉinmedicinan apotekon. En kuracado ili aplikas ultrasonan stimulon, laseran prilumon, magnetan kuracadon kaj likvaj-injektadon. Iuj fakuloj atingis sukceson en esploro pri la baza teorio de akupunkturo kaj mokso.

## KIOM DA ANTIKVAJ LIBROJ EN ĈINIO?

Lastatempe oni faris enketon pri 22 publikaj bibliotekoj kaj 38 akademaj bibliotekoj de Ĉinio. La rezulto montris, ke en la menciitaj bibliotekoj konserviĝas pli ol 14 milionoj da antikvaj libroj. Fakuloj taksis, ke Ĉinio havas almenaŭ 50 milionojn da antikvaj libroj.

La skribaĵoj sur bovostoj aŭ testudaj ŝeloj, faritaj en la 13-a jc a.K., estas la plej frua antikva dokumento. Estas pli valoraj la manuskripto de Dunhuang, trovita sur la Silka Vojo, kaj la verkoj, kiaj la granda enciklopedio Yong Le Da Dian kaj la kompleta libraro Si Ku Quan Shu.



## En ŝtona mondo

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

**E**N la regiono Anshun de sudokcidenta Ĉinio estas multaj vilaĝoj el blanka-ŝtonaj domoj. Min altiris iliaj konstruaĵoj en aparta stilo kaj iliaj loĝantoj en blua robo kaj kun prononco de nordanoj de Ĉinio.

El ili Yunshan-vilaĝo kun historio de pli ol 600 jaroj estas la plej bone konservita. Ĝi situas en valo inter montoj. Elaŭtiginte, oni devas piediri longan vojon por atingi la vilaĝon. Antaŭ ĝi staras arka pordego el gigantaj ŝtonoj. Ambaŭflanke de la pordego serpentumas ŝtonaj muroj altaj je 6 m, kun kreneloj. Longa strato kun larĝo de 5 m, pavimita el ŝtonoj, kondukas en la vilaĝon. Apud la strato estas butikoj el ŝtonoj, tipaj kvadrataj kortoj kun ŝtonaj ĉirkaŭmuroj kaj ruinoj de scenejo kaj apoteko. Ĉie videblas ŝtonaj dombazoj, muroj, ŝtuparoj kaj ŝtonplataj fasadoj. La bone konservitaj pordoj kaj fenestroj kun belaj gravuraĵoj enkorpiĝas la

kombinon de la ĉeloka arkitekturo kun tiu de la regiono sude de Yangzi-rivero. La vilaĝo kun areo de pli ol 2 000 kvadrataj metroj havas 156 familiojn kun malpli ol 800 anoj. La ĉefstrato longas je 580 m kaj etendiĝas tra la tuta vilaĝo. Ĉiuj domoj interkomunikiĝas per ŝtonaj stratetoj. La vilaĝo havas 2 postajn pordojn kaj ŝtonajn murojn kun kreneloj. En ĉiuj gravaj lokoj de la vilaĝo troviĝas gardejoj.


Ŝajnis, ke la vilaĝanoj jam kurtimiĝis al renkontiĝo kun alilokanoj, kiaj ni. Iu mezaĝa virino, en longa blua zono ĉe la talio kaj blua robo kun borderaĵoj ĉe la kolumo, manumoj kaj baskoj, estis lavanta legomojn sur ŝtona ŝtuparo antaŭ la domo. Vidinte nin, ŝi starigis kaj invitis nin al sia hejmo. Ŝia hartubero estis ornamita per arĝenta ĉeno kaj ruĝaj bidoj kaj la supra parto de ŝia kapo ĉirkaŭvolvita per blua rubando. Ŝi portis ankaŭ arĝentajn orel- kaj fingr-ringojn. Ŝajnis al ni, ke ŝi estis izolita for de la nuna mondo. Ni multe demandis ŝin kaj ŝi paciencie respondis al ni. Intertempe ŝi prenis el la ĉambro manfaritajn ŝuojn kun alta dorso kaj feniksa kapo sur la pinto kaj surmetis ilin. Ŝi kun rideto klarigis al ni: "Tiajn ŝuojn oni portas nuntempe en festaj tagoj."

De kie venis la loĝantoj kaj kiel formiĝis la vilaĝoj? S-ro Li Chengye el la administra departe-

mento de historiaj objektoj en la regiono Anshun diris al ni, ke laŭ historiaj notoj la regiono Anshun estis grava pasejo de centra Ĉinio al la sudokcidenta. En Mingdinastio (1368-1644) la kortego sendis al ĝi garnizonon el 200 000 anoj ekspluati virgan teron. Ili plejparte venis el la provincoj Jiangsu (Ĝjangsu), Zhejiang (Ĝeĝjang), Jiangxi (Ĝjangŝji) kaj Anhui de Ĉinio. Poste, iuj el ili transloĝiĝis en la provincon Guizhou, edziĝis al lokanoj kaj konstruis tie sian hejmlokon, tiele formiĝis 300 vilaĝoj, kiuj restas tre valoraj por historia esplorado. Laŭ la plej nova statistiko, 200 000-300 000 tiaj vilaĝanoj loĝas en la meza parto de Guizhou.


Iliaj festoj, kiuj plejparte rilatas kun terkulturaj sezonoj, havas intensan koloron de kazerna vivo, ekz., la "batalo kun ŝtono kiel armilo", ludata en la Printempa Festo, ankoraŭ furoras eĉ hodiaŭ. Ĝi estas unu el la militaj amuzoj. Anshun-opero, origine amuzajo en kazerno, temas ĉefe pri historiaj militaj aferoj. Ĝi estas ofte ludata kaj tre ŝatata de la vilaĝanoj. Oni en robo kaj kun ligna masko prezentas la operon, kantante kaj luktante, akompanate de tamburado kaj gongado.

Menciindas, ke la vilaĝanoj kun malsamaj moroj kaj kutimoj harmonie vivas kun siaj najbaroj, kiuj bone komprenas kaj respektas ilin. ■



**Strato de la urbeto**





Kapornamo de virino

Parto de la antikva urbeto



Fratoj



Maljunulino en altdorsaj ŝuoj kun figuro de feniksa kapo



Parto de mara-petrola produktejo de Ĉinio

# Kial malmultiĝis pasaĝeroj de trajno?

de JI PING

**A**NTAŬE estis supersargitaj la ĉinaj pasaĝeraj trajnoj, kies bileton oni mal-facile aĉetis eĉ 10 tagojn anticipe, sed nun oni sukcesis jam en la sama tago de la vojaĝo kaj la pasaĝeroj evidente malmultiĝis. Ne eblas, ke oni rapide-plimultiĝis en mallonga tempo la pasaĝerajn trajnojn kaj fervo-

jojn. Kial do malmultiĝis pasaĝeroj de trajno?

Hodiaŭ, en Ĉinio multiĝis la trafikaj manieroj. Tio ebligas al vojaĝantoj libere elekti veturmanieron, tempon kaj prezon. Laŭ statistiko, de 1990 ĝis 1995, en Ĉinio la ŝoseoj plilongiĝis je 10.4% kaj la aerlinioj de civila aviado je 128.9%, sed la fervojoj je nur 7.8%. La procentaĵoj de pasaĝera kaj vara transportoj per trajnoj malkreskis respektive de 53.4% kaj 71.3% en 1990 al 41% kaj 53.4% en 1995.

Ekspreso veturanta sur la fervojo de Chengdu al Chongqing (Ĉongĉing), Sichuan-provinco, kun totala longeco de 504.6 km. bezonas 9.15 horojn, dum aŭtobuso veturanta sur la nove konstruita ŝoseo de Chengdu al Chongqing kun totala longeco de 340.2 km. — 3.5-4 horojn. Nun ĉiutage sur la ŝoseo inter tiuj du urboj veturas aŭtobusoj 2 360-foje, sed sur la fervojo nur 16 trajnoj. Plie, la proporcio de prezoj de busbileto kaj trajnlitvagona bileto estas 0.5:1. Jen kial oni preferas vojaĝi per aŭtobuso por ŝpari monon kaj tempon.

Krome, la disvolviĝo de aertrafiko reduktis ankaŭ la fervojan transporton. Vojaĝi per aviadilo estas kompreneble multe pli komforte kaj rapide ol per trajno kaj aŭtobuso. Kaj la prezo estas akceptebla por pli kaj pli multaj homoj, dank' al la altiĝo de ilia vivnivelo. Aliflanke, post kelkfoja leviĝo de la prezo de trajnbileto, la proporcio de la prezo de

aviadila bileto kaj tiu de luksa trajn-litvagono fariĝis ĉ. 1:1.5.

Oni devas konfesi, ke malmultiĝo de pasaĝeroj de trajno akcelis la konkurencon en la trafika kampo. Energie multigante novajn liniojn, la fervoja departemento reformas malnovan transporton kaj plibonigas servon kaj labormetodon, ekz., aldoni rapidajn turismajn trajnojn kaj postuli, ke la konduktoroj laboru devokonscie. Antaŭe oni ordigis la litaĵojn 2 horojn antaŭ ol atingi finstacion, sed nun oni faras tion post elvagoniĝo de pasaĝeroj. Por gajni pli da pasaĝeroj, oni plibonigas ankaŭ la kvaliton de manĝaĵoj, plimultigis la servajn fojojn ktp. Malgraŭ ĉio tio, la fervoja situacio estas ankoraŭ malfavora.

# Ĉinio — la kvina turisma lando

de ZHENG BIAN

**T**URISMO estas rigardata kiel nova grava afero en la nuna ĉina nacia ekonomio. Laŭ la statistiko farita de la Ĉina Turisma Administracio, en 1995 ĉ. 46.4 milionoj da eksterlandaj turistoj vojaĝis en Ĉinio kaj per tio Ĉinio gajnis 8.73 miliardojn da usonaj dolaroj. Ĉinio jam fariĝis la kvina turisma lando.

En la lastaj dekelkaj jaroj la ĉina turismo rapide progresis, dank' al la praktikado de la pordo-malferma politiko kaj stabileco de la socio. Aliflanke, abundaj turismaj lokoj kaj diversstaj hoteloj kun senĉese pliboniĝanta servo liveras bonajn kondiĉojn al turistoj ĉinaj kaj alilandaj.

Por plibonigi la turismajn produktojn kaj merkaton, de post 1992 la ĉina turisma departemento lanĉis serion da turismaj programoj, kiaj "92 Turisma Jaro", "93 Turismo pri Ĉinaj Pejzaĝoj", "94 Turismo pri Ĉinaj Historiaj Restaĵoj", "95 Turismo pri Ĉinaj Popolaj Moroj" kaj "96 Feria Turismo en Ĉinio". Tio ne nur montris al la turistoj de la tuta mondo la turisman kvintesencon de Ĉinio, sed ankaŭ ebligis al multaj pli profunde koni Ĉin-

ion. "Vojaĝi al Ĉinio" jam fariĝis granda deziro de multaj alilandaj turistoj.

En la nova jaro 1997, la ĉina turisma departemento prezentis al la turistoj novan programon, t.e. "97 Turisma Jaro de Ĉinio". Oni povas diri, ke la programo, kiu kombinas kaj disvolvas tiujn de la pasintaj 5 jaroj, estas pli enhavoriĉa kaj perfekta. Ĝi rekomendas 35 famajn vidindejojn statnivelaĵojn kaj 48 turismajn festaĵojn laŭ 16 turismaj itineroj. Oni povas kredi, ke en 1997 la ĉina turismo havos pli ĝojigan disvolviĝon.

## KURANTAJ AFEROJ


● La Projekto de la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero oficiale ekpraktikata en 1993 jam ricevis 17 miliardojn da juanoj. La konstruo bone disvolviĝas kaj povos finiĝi antaŭ la difinita tempo. Pli ol 20 000 konstruantoj jam plenumis fosadon de 83% de 350-metre larĝa kanalo kiel nova vojo de Yangzi-rivero. Tiun kanalon oni provos aprile de 1997. Krome, la 1 118.66-metra Xiling-ponto super Yangzi-rivero jam finkonstruiĝis kaj la soseo kun longeco de 28.8 km de la konstruejo ĝis la urbo Yichang, Hubei-provinco, estis malfermita.



● La mara-petrola industrio de Ĉinio plej frue komencis industriaran kunlaboron kun aliaj landoj. Dum la pasintaj pli ol 10 jaroj la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Mara Petrolo subskribis kun pli ol 60 alilandaj kompanioj 119 interkonsentojn kaj kontraktojn pri mara-petrola ekspluatado. Ĝis la 6-a de septembro 1996 la jara produktokvanto de mara nafto jam superis 10 milionojn da tunoj.

● De post 1978 la internacia ekspozicia afero rapide disvolviĝis en Ĉinio. En 1995 okazis sole en Pekino 158 internaciaj ekspozicioj pri industrioj aŭta, konstru-materiala, presa k.a. kun monda avangarda nivelo. La Internacia Sinteza Aŭto-industria Ekspozicio kune okazigita de maŝina, komerca, aŭta kaj aliaj departementoj allogis per sia aŭtoritateco multajn eksterlandajn ekspoziciitojn kaj klientojn. Ĝi sukcesis kun kontentiga profito. Kaj la Internacia Ekspozicia Centro de Ĉinio, kiu invitas internaciajn ekspoziciojn, estas unu el la fenestroj malfermitaj al la mondo.

● La trinkaĵa produkto-kvanto de Ĉinio multigis de 280 000 tunoj en 1980 al 10 milionoj da tunoj en 1995. Antaŭe Ĉinio produktis nur karbonacidan trinkaĵon, sed nun trinkaĵojn fruktsukan, vegetalproteinan, laktan kaj iujn aliajn.







1. Folkloro turismo  
Foto de Sun Shuqing
2. La Okcidenta Lago en printempo  
Foto de Jin Yaowen
3. Sur la Granda Muro  
Foto de Li Chungeng
4. Montpintoj  
Foto de Li Chungeng
5. Emblemo de '97 Turisma Jaro de Ĉinio
6. Lijiang-rivero en mateno  
Foto de Sun Shuqing

1	2	
3	4	5
	6	





# Gazetara konferenco sen angla-lingva interpretado

**V**ERŜAJNE la 3-a de septembro 1996 estas neforgesebla por alilandaj raportistoj en Pekino. En tiu posttagmezo ili kolektiĝis en la Pekina Internacia Klubo.

“Saluton, s-inoj kaj s-roj! Hodiaŭ mi ne havas novaĵon por publikigi kaj nun respondos viajn demandojn, profitante la okazon,” aplombe diris s-ro Shen Guofang, proparolanto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio, kaj lia parolo ne estis interpretita en la anglan lingvon.

En la 70-aj jaroj la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio komencis regule okazigi gazetaran konferencon. En ĝi proparolanto de la ministerio pritraktis la starpunkton kaj sintenon de la ĉina registaro pri gravaj internaciaj problemoj kaj publikigis gravajn novaĵojn. En la 90-aj jaroj la pozicio de Ĉinio daŭre leviĝas en la mondo; la kontakto inter Ĉinio kaj aliaj landoj pli oftigas ol iam ajn antaŭe; kaj pli kaj pli da alilandaj raportistoj vizitas Ĉinion. Sub tiu cirkonstancaro estas rompita la rutino servigi angla-lingvan interpretiston al gazetara konferenco.

La lastan julion proparolanto de la ministerio deklaris, ke ekde septembro 1996 ĉina gazetara konferenco, kiu okazas dufoje semajne, iros sen angla-lingva interpretado; ĉiuj raportistoj devos uzi la ĉinan lingvon por fari demandojn; kaj proparolanto de la ministerio respondos en la sama lingvo. En la gazetara konferenco, kiu okazis unuafoje sen angla-

lingva interpretado, iu japana raportisto la unua demandis la proparolanton en la ĉina lingvo kaj sekvis silento dum du minutoj.

“Permesu al mi demandi, s-ro proparolanto, kian senton nun vi havas?” demandis lin raportisto de la Azia Wall-strata Ĵurnalo.

“Verdire, mi sentas malfacilon, ĉar mi devas streĉi mian atenton ne nur por kompreni viajn demandojn kun ia prononco, sed ankaŭ por respondi tuj. Ankaŭ vi, raportistoj el diversaj landoj, sentas malfacilon, aŭskultante mian parolon en la ĉina lingvo. Mi kredas, ke ni ĉiuj rapide adaptiĝos al la nova ŝanĝiĝo,” respondis la proparolanto.

Vigliĝis la atmosfero, kaj pluraj raportistoj levis sian manon.

La loĝantaro de Ĉinio konsistigas kvinonon de tiu de la mondo, la ĉina lingvo estas uzata kiel unu el la oficialaj lingvoj de UN kaj ĉiuj nacioj havas sian propran lingvon, tamen la angla lingvo estas vaste uzata en la mondo. En Ĉinio ofte aŭdeblas la demando: “La angla lingvo estas internacia lingvo?” Pro lingva baro oni devas pagi grandan monsumon por tradukado en internaciaj kunvenoj. Por pli bone servi al siaj diplomaciaj aferoj, la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio faris reformadon al gazetara konferenco, t.e. nuligi angla-lingvan interpretadon.

Oni asertis, ke en la unua tia konferenco okcidentaj raportistoj ne faros demandojn kaj la proparolanto povos nur respondi demandojn de raportistoj el Hongkong kaj Taiwan kaj la konferen-

co malsukcesos. Neatendite, ĝi iris en atmosfero serioza kaj vigla.


Malhavo de angla-lingva interpretado maloportunas alilandajn raportistojn. En la pasinteco ne estis problemo por ili bone aŭskulti kaj kompreni la proparolanton pere de angla-lingva interpretado. Sed nun ili devas, antaŭ ĉio, peni aŭskulti ĉin-lingvan parolon por sukcesigi sian laboron.

Iuj opinias, ke la faro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio estas montriĝo de ekskluzivisma naciismo kaj ne respondas al la politiko de pordomalfermo. Venas al ni la demandoj: Ĉial do la angla lingvo, centpocenta nacia lingvo, povas esti uzata kiel universala lingvo? Ĉu pro tio, ke ĝi estas pli forta, aŭ nur pro kutimo sekvata dum multaj jaroj?

Objektive, la decido de la ĉina ministerio estas problemo malfacila por la fortaj nacioj uzantaj la anglan lingvon kaj pensigas ilin pri la lingva problemo en internacia komunikado kaj pri tio, ke la lingvoj de la malfortaj nacioj devas esti respektataj.

Kvar monatoj forpasis de kiam oni ne bezonis angla-lingvajn interpretistojn por gazetara konferenco. La ĉina lingvo estas ofte parolata de alilandaj raportistoj en Ĉinio. Iu alilanda raportisto kun ŝerco diris al mi: “Se mi ne diligente lernus la ĉinan lingvon, mi perdus mian profesion.” Ĉiuj alilandaj raportistoj en Ĉinio komprenas, ke ju pli bone ili parolas la ĉinan lingvon, des pli sukcese ili laboras. ■





# Hejmloko de ĉielaj ĉevaloj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

**T**RANSIRINTE la monton Wushaoling, nia aŭto eniris kvazaŭ en galerion de montoj: Sude ondas Qilian-(Ĉiljan)-montaro kaj norde etendiĝas montaroj okcidenten. Tie estas la fama Koridoro Okcidente de la Flava Rivero, kiu longas pli ol 1 000 km kaj larĝas de kelkaj ĝis cent km. Ĝi kondukas rekte al la Xinjiang (Ŝingĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Antaŭ 2 000 jaroj la koridora regiono estis okupita de hunoj. Ili ofte prirabis ordinarajn loĝantojn kaj mortigis komercistojn. Ili arestis Zhang Qian, senditon de la ĉina imperiestro Wudi de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) kaj sklavigis lin por dekelkaj jaroj. En la jaro 121 a.K. la imperiestro dufoje lanĉis militon kontraŭ la hunoj kaj la ĉina armeo forpelis ilin el la koridora regiono. La imperiestro starigis tie garnizonon kaj la prefektujojn Wuwei (Uŭej), Zhangye, Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) kaj Dunhuang. Fakte, la nomadismaj hunoj ĉiuj estis lertaj rajdistoj kaj por ilin venki nepre necesis elstaraj ĉevaloj en la batalo, krom alta batalspirito de la soldatoj. Por tio imperiestro Wudi decidis transloĝigi popolanojn de aliaj lokoj de Ĉinio al la koridora regiono, por ke tiuj ĉi bredu tie militajn ĉevalojn. Tial la regiono fariĝis fama ĉevalpaŝtejo de Ĉinio.

## ĈIELAJ ĈEVALOJ EN ĈINIO

Post la malfermo de la Silka Vojo por imperiestro Wudi la plej urĝa afero estis enkonduki bonrasajn ĉevalojn.


Kiam Zhang Qian unufoje vojaĝis al okcident-aziaj landoj, li vidis bonrasajn ĉevalojn, kiuj ŝvitis kiel sangado, en Dayuan-regno, kaj poste li raportis tion al la imperiestro. Historiaj libroj notas, ke tiuj sang-ŝvitaj ĉevaloj sur altaj montoj de Dayuan estis malfacile kapteblaj. La tieaj loĝantoj do lasis siajn kvinkolorajn ĉevalinojn paŝtiĝi sur la montoj. Post kiam tiuj ĉevalinoj gravediĝis, ili kondukis la ĉevalinojn hejmen kaj tiamaniere ili havigis al si sang-ŝvitajn ĉevali-

dojn, kiujn oni nomis siatempe ĉielaj ĉevalidoj.


Post la duafoja vojaĝo en la menciitaj landoj Zhang Qian kunportis la donacon de la reĝo de Wusun-regno al imperiestro Wudi, t.e., 10 altajn kaj fortikajn ĉevalojn. La imperiestro tre ĝojis kaj nomis ilin ĉielaj ĉevaloj. Poste la reĝo de Wusun-regno donacis al la ĉina suvereno 1 000 bonrasajn ĉevalojn por svati sin al lia filino. Ĉi lasta kun ĝojo konsentis la boparencon.

Kvankam imperiestro Wudi havis bonrasajn ĉevalojn donacitajn de la regno Wusun, li ankoraŭ deziregis sang-ŝvitajn ĉevalojn kaj sendis aĉeti ilin en Dayuan per alta prezo. Tamen Dayuan-anoj rabis

## SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. Paŝtado
2. Dresado de ĉevalo
3. Paŝtistoj
4. Ĉevalbredado instruata
5. Por veturigi infanojn de paŝtistoj al lernejo

1	2
5	3
	4



la trezorojn por la aĉeto kaj mortigis la senditon de la Okcidenta Han-dinastio. Imperiestro Wudi eksplodis de kolero kaj decidis milit-ataki Dayuan. Post kvar jaroj Dayuan malvenkis kaj petis armisticon kun bonrasaj ĉevaloj kiel kompenso. La armeo de Han-dinastio havigis 3 000 bonrasajn ĉevalojn kaj revenis al sia lando. La ĉina imperiestro ordonis konstruigi multajn ĉeval-restadejojn sur la revenvojo, por ke tiuj ĉevaloj ne tro laciĝu de longdaŭra irado.

Trovinte, ke la ĉevaloj de Dayuan estas pli bonaj ol tiuj de Wusun, la ĉina suvereno donis al la lastaj la nomon Ekstrema Okcidento kaj al la antaŭaj la nomon Ĉielaj Ĉevaloj. Li verkis odon pri ĉielaj ĉevaloj. Wudi opiniis, ke la ĉielaj ĉevaloj estis donacitaj de la Dio kaj sekve ordonis fari "orajn ĉeval-hufojn" por soleni la feliĉon. Tio estas notita en historiaj libroj de Ĉinio. Post 2 000 jaroj ĉinaj arkeologoj trovis du orajn ĉeval-hufojn en la ruino de Shanglin-ĉasejo destinita por Wudi. Ĉiu ora hufo pezas 500 gramojn.

La ĉielaj ĉevaloj fiksloĝiĝis en la koridora regiono. Ili ne nur faris gravajn meritojn por defendi la Silkan Vojon, sed ankaŭ pariĝis kun ĉinaj ĉevaloj, tiel ke produktiĝis eminentaj specioj de ĉevaloj, dank' al tio la ĉeval-bredado de Ĉinio rapide disvolviĝis.

## BRONZA GALOPANTA ĈEVALO — TREZORO EL ANTIKVA TOMBO

Post kiam imperiestro Wudi havigis al si ĉielajn ĉevalojn, en Ĉinio aperis la legendo "Ĉevaloj galopas sur la ĉielo", kaj plie, oni faris ĝian figuron el bronzo.

Jen bronza ĉevalo. Ĝiaj tri piedoj levigas kaj la kvara tretis birdon. La ĉevalo henas kun levita kapo. En antikva tombo de Wuwei ĝi akompanis mortintan generalon pli ol 1 700 jarojn. Kamparanoj trovis ĝin en 1969, kiam ili fosis kanalon. En la tombo estis ankaŭ aro da bronzaĵoj kaj argilaj militistoj.

La bronza ĉevalo galopis tiel rapide, ke ĝi facile kuratingis la flugantan birdon. La artisto lerte solvis mekanikan problemon, ke la ĉevalo 34.5 cm alta, 45 cm longa kaj 7.1 kg peza, perdinte graviton en galopado, firme staru sur la birdo.

Elterigite, la bronza galopanta ĉevalo eksponiĝis en dekkelkaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko kaj ricevis laŭdon de multaj vizitantoj. Pro tio la loĝantoj de Wuwei sentis grandan fieron. En Ĉinio oni prenis la galopantan ĉevalon kiel emblemon de la ĉina turismo kaj Wuwei-anoj faris pli grandan similan ĉevalon el bronzo, kiu majestas super la urbocentro. Ili diris kun fiero: "Nia ĉevalo estas la plej granda kaj plej bona en Ĉinio!"



Sovaĝaj ĉevaloj bredataj en la centro

Wuwei estis la unua grava el la kvar prefektujoj. Ĝi situas en la orienta parto de la koridora regiono. En la ĉina lingvo la nomo Wuwei simbolas majestecon de imperiestro Wudi. Post kiam okcidentaj ĉevaloj enkondukiĝis en Ĉinion, tie aperis granda foiro de bonrasaj ĉevaloj. Historiaj libroj diras, ke siatempe la ĉevalfoiro multe prosperis. Oni venis tien el diversaj lokoj de Ĉinio por aĉeti kaj rigardi ĉevalojn. Havigi al si altan bonrasan ĉevalon estis la plej fierinda afero por la tiamaj ĉinoj.

Por la generaloj, kiuj servis en la armeo la tutan vivon, ĉevaloj estis plej gravaj. Ili preferis entombiĝi kun artefaritaj ĉevaloj post sia morto, ĉar tio montris ilian militistan rangon. Jen kial en Wuweimuzeo videblas ne nur elterigita bronza galopanta ĉevalo, sed ankaŭ lignaj kaj argilaj ĉevaloj.

En Wuwei mi hazarde trovis iun butikon de seloj, vipoj kaj junĝiloj. La butika mastro tiam huf-feris grandan ĉevalon.

## SOVAĜAJ ĈEVALOJ SUR LA DEZERTO

Sub la arda suno la dezerto Tenger estis morte silenta. Ni en-trudiĝis tien por rigardi sovaĝajn ĉevalojn. La Esplora Centro de Pereontaj Bestoj nordoriente de Wuwei troviĝas sur ĝi.

"Sovaĝaj ĉevaloj preskaŭ pereis en Ĉinio. La malmultaj bredataj jam perdis kapablon vivi sur dezerto. Ili rapide degeneras," diris s-ro Zhang Guoqi (Ĝang Ĝuoĉji), vicestro de la centro. "Por la homoj la bestoj estas riĉfonto. Pereo de ĉiuj aĵoj sovaĝa besto estas perdo por la homoj. Protekti sovaĝan beston signifas konservi genobankon. Ju pli da tiaj bankoj, des pli da riĉfontoj."

"Ĉu ne estas pli bone, se oni bredas sovaĝajn ĉevalojn en fekunda loko?"

“Ne, nia savado de sovaĝaj bestoj ja celas gardi iliajn trajtojn kaj originajn genojn, por ke ili revenu en la naturon. Ĉi-flanke la homa bredado ne havas grandan signifon, tial nur en la primitivaj ekologiaj medioj ili povas retrovi la vivopovon sub la libera ĉielo. Se ni sukcesos gardi la genojn de sovaĝaj ĉevaloj, ni povos reformi la hejmajn ĉevalojn per ili. Jen sovaĝaj ĉevaloj mongolaj kaj tibetaj. Iliaj prapatroj pariĝis kun bonrasaj ĉevaloj enkondukitaj de eksterlande,” diris s-ro Zhang kaj kondukis nin en vastan stalon. Tie mi vidis kelke da terflavaj sovaĝaj ĉevaloj kun mallongaj hirtaj kolharoj. Aspekto ili diferencas de hejmaj ĉevaloj, tamen tute sen sovaĝeco.

“Kiamaniere rehavigi al ili la naturan sovaĝecon?”

“Ni devas fari multon por tio. Nia bredejo estas tre vasta, tamen la bestoj al kutimiĝas nur al bredado en difinitaj horoj kaj lokoj. Ni do ofte ŝanĝas la lokojn por ĉesigi la bredadon post unu aŭ du jaroj kaj lasi ilin vivi en pli vasta bredejo, kie ni kulturigas dezertajn plan-




Paŝtista familio

## Amuziĝo








**Argila ĉevalo elterigita en Wuwei**

**Bronza ĉevalo**



**Ruino de domo ĉe antikva ĉeval-paŝtejo**





tojn, tamen nesufiĉajn, por ke ili mem serĉu manĝaĵojn. Kiam ili multigis je certa kvanto en spontana produktado, ni lasos ilin vivi en la naturo...”

“Ĉu ilin ne formanĝos lupoj?” demandis mi kun maltrankvilo, rigardante la dezerton.

“Alilandaj fakuloj trovis, ke la sovaĝaj bestoj degeneras, se oni mortigas ĉiujn lupojn por protekti ilin, ĉar lupoj manĝas tiujn bestojn, kiuj havas malfortan vivipovon. Tio helpas al ni plibonigi ĉeval-rasojn, sed nun ni ne povas lasi ĉiujn sovaĝajn ĉevalojn en la naturon, ĉar ili ankoraŭ ne kapablas gardi sin mem.”

Ekventis, tamen en la stalo estis silento. Kiel mi deziris aŭdi henadon de sovaĝaj ĉevaloj!

## PAŬTISTOJ

La ĉeval-paŝtejo Shandan inter Wuwei kaj Zhangye areas pli ol 2 000 kvadratajn kilometrojn. Ĝi eble estas la plej antikva ŝtata ĉeval-paŝtejo de la mondo. En la Okcidenta Han-dinastio imperiestro Wudi starigis tie garnizonon kaj paŝtigis ĉevalojn kaj de tiam ĝi estis administrata sole de la registaro. En 450 p.K., kiam regis la Norda Wei-dinastio, tie vivis du milionoj da militaj ĉevaloj. Iu paŝtisto ŝerce diris: “Nia paŝtejo jam aĝas pli ol 2 000 jarojn kaj ĝia unua estro estis imperiestro Wudi. Mi venis tre malfrue kaj, bedaŭrinde, mi ne vidis lin.”

Oni ja ne scias, al kiu generacio apartenas tiu paŝtisto kun longaj vangharoj, tamen sur lia bruna vizaĝo mi vidis signojn de la malfacila paŝtista vivo.

Oni prave diras, ke la ĉevaloj ne grasiĝas sen manĝi nokte, tial la paŝtistoj devas labori tage kaj nokte. En la sekvanta tago post nia alveno ekblovis sur la altebenaĵo ventego kun miloj da tunoj da sablo. En palpebruma daŭro malheligis la ĉielo. Historia libro diras, ke iam estis la regno Heishui, kiu pereis en iu nokto pro tia ventego. Post la silentiĝo de la vento sur la stepo mi renkontis knabon reven-

intan de nokta paŝtado. Plena de polvo tutkorpe, li diris tamen: “Ja estis bone, ke la vento blovis nur unu tagnokton kaj neniu ĉevalo perdis.” Kun miro mi rigardis lin, kaj ĉi tiu ekridetis: “Tio ne gravas, ĉar antaŭe maljunaj paŝtistoj iam devis klopodi tri tagnoktojn en neĝstormo por gardi ĉevalojn.”

La 53-jara Qiu Huaihe (Ĉiŭ Hŭajhe) laboris kiel paŝtisto jam 30 jarojn. Li diris: “Vintre estis ege malvarme. Mi devis kunporti botelon da alkoholaĵo en la sino. Kiam mi estis malsata, mi ekbruligis ĉeval-fekajon kaj varmigis glaciĝintan manĝaĵon sur la fajro. Mi manĝis neĝon kaj trinkis alkoholaĵon, kiam mi soifis. Poste mi faris neston en neĝo, en kiu mi iom dormis, envolviginte en ŝafpelton...”

“Tamen en pluva tago ni ne kuraĝis deĉevaliĝi, ĉar tiam la feltaĵoj, saturitaj de pluvakvo, pezis pli ol kvindek kilogramojn. Se ni deĉevaliĝus, do ni ne plu povus surĉevaliĝi,” daŭrigis alia paŝtisto.

Nia interparolo estis rompita de kruda henado. Nigra ĉevalo, tre malobeema, alte levis siajn antaŭajn hufojn kaj laŭte henis. “Ĝi estas hibridigita Shandan-ĉevalo. Ni komencis hibridigi tiuspecajn ĉevalojn en la 50-aj jaroj, kiuj iam marŝis kontinue 16 000 km kaj transgrimpis la monton Tanggula 6 000 m super la marnivelo,” diris Xiao Han de la paŝtejo. Li daŭrigis, ke en la moderna socio por trafiko kaj milito ĉevaloj ja ne estas bezonataj, tamen ni bredas milojn da bonrasaj ĉevaloj en la ĉeval-paŝtejo Shandan por konservi tiun riĉfonton.

En la komenco de julio oni devas konduki la

ĉevalojn en profundan monton. Somere la primitiva arbaro sur Qilian-montaro estas paŝtejo riĉa je akvo kaj herboj. Tie la paŝtistoj devas mem starigi tendon kaj fari fornon por prepari manĝaĵojn. Vespere ili trinkas alkoholaĵon kaj manĝas ŝafajon sub kerosena lampo. En la profunda montaro ofte neĝas matene, pluvas tagmeze kaj prujnas vespere. Sub la humidaj litkovriiloj ili malfacile endormiĝas. La paŝtistoj do faras kampfajron. Junuloj kantas popularajn kantojn kaj maljunuloj Shaanxi(-Sensŝi)-ajn kantojn sub la luno.

“Ĉevaloj estas niaj fidelaj amikoj,” diris maljuna paŝtisto. “Kiam furiozas ventego, rajdĉevaloj povas porti siajn mastrojn por trovi la disigitan ĉeval-gregon. Minacate de lupoj, la ĉevaloj ofte henas, prancas kaj iam kaptas ĉapon de la dormanta mastro por lin vekti. En pluva nokto, kiam la mastro falas de sur rajdĉevalo pro ebriiĝo, ĝi do surgenuiĝas kaj lekas lin, por ke ĉi tiu vekigu kaj surĉevaliĝu. Se la mastro vundiĝas, ĝi do malĝoje henas, por ke aliaj paŝtistoj savu la vunditon...”

Pro ĉio ĉi tio la paŝtistoj amas ĉevalojn kiel siajn infanojn. ■

### Ruino de la regno Heishui



**E**KDE 1963 Ĉinio sendis entute 15 000 medicinistojn al pli ol 60 landoj kaj regionoj de Azio, Afriko, Latinameriko, suda Pacifiko kaj Mediteraneo, kie la kuracado estas postiginta. Tiuj ĉinoj ne nur servis per medikamentoj kaj kuracarto, sed ankaŭ oferis sian sangon aŭ haŭton, iuj eĉ sian vivon. Tiel la servitaj registaroj kaj popoloj laŭdis ilin kiel "medicinajn senditojn" kaj "homojn plej bonvenajn".

### KONFIDI GRAVAN MALSANULON AL ĈINAJ KURACISTOJ

Tio okazis en hospitalo de Kamerunio. En profunda nokto ĉinaj kuracistoj estis vekitaj de urĝaj krioj. Malgraŭ laciĝo ili senhezite iris al la urĝa kuracejo, kie ilin atendis homo mortonta pro trosangado kaŭzita de traŭmato. Li bezonis operacion. Tamen tiam ne estis lia familiano. Mankis ne nur bezonataj medikamentoj kaj instrumentoj por operacio, sed ankaŭ laborantoj en la laboratorio, radioaktivejo kaj operaciejo. En tiu momento la ĉinaj kuracistoj senhezite decidis fari operacion. Sen astra lampo ili uzis aliajn elektrolampojn; sen torako-drentubo ili uzis anestezan trakeo-tubon... Finfine sukcesis la operacio.

Post unu monato la patrino de la resaniĝinta operaciito kun dankaj larmoj manpremis kun la ĉinaj kuracistoj. La fakto estis, ke en la menciita nokto familianoj de la vundito devigite lasis lin sola en la hospitalo, ne havante monon por kuraco. La okazintaĵo montris, ke efektive la ĉinaj kuracistoj ĉiamaniere savis ĉiujn lokajn malsanulojn. Nun vizaĝe al sia filo, la patrino kaj dankis la ĉinajn kuracistojn kaj sentis konsciencoriproĉon...

### ESTI MULTKAPABLAJ

Ĝenerale mankas kuraciloj



Ĉina kaj alilanda kuracistoj en diagnozo

WANG JUNFENG kaj SHU MEI:

# Ĉinaj kuracistoj en aliaj landoj

kaj kuracistoj al la lokoj servitaj de la ĉinaj kuracaj taĉmentoj. Tiaokaze la ĉinaj kuracistoj devas esti kapablaj trakti diversajn malsanulojn, kvankam en Ĉinio ili estis fakaj doktoroj.

S-ro Hao Yongcun estis gvidanto de la ĉina kuraca taĉmento, kiu helpis Beninon. Li rakontis sian travivaĵon:

"Mi estas ordinara kirurgo. La suferantoj de stomatito ofte embarasis min, kiam mi volis, sed ne povis. Foje venis iu sufer-

antino de gingivo-tumoro. La tumoro granda kiel pugno preskaŭ okupis ŝian buŝkavon. Tia malsano estas jam ekster mia fako, mi do proponis al ŝi peti kuracadon de stomatologia kirurgo. Ŝi malespere foriris. Antaŭtagmezon post kelkaj semajnoj, la estro de la hospitalo kondukis min en la hejmon de la suferantino. Ĝis nun mi ne povis forgesi la mizeran scenon: En malnova, malalta kaj malluma kabano ses infanoj ĉirkaŭas sian mortontan

patrion. Ili preskaŭ ne havas meblon. Mi estis tiel korprenita, ke mi firmigis mian volon kuraci ŝin. Poste, subtenate de la kolegoj, mi sukcesis operacii ŝin.”

### “MIRINDE, ĈINA AKUPUNKTURO!”

Per longa kaj maldika arĝenta pinglo oni povas forigi doloron, eĉ kuraci longe suferatan malsanon. Tio estas neimagebla por alilandanoj. Tamen por ĉinaj kuracistoj en taĉmentoj, akupunkturo estas ofta kuracmetodo pro sia oportuneco en lokoj medicine postgintaj.

Je la komenco alilandanoj iom dubis pri la kurac-efiko de akupunkturo. Iu akupunkturisto, servanta en Malio, rakontis: “Multaj suferantoj aŭskultis propagandon kaj kun hezito vizitis nin. La kuraca efiko puŝis ilin fari propagandon.” Foje iu ŝtaticisto de la malia registaro longe suferis de vizaĝa tordiĝo pro apopleksio. Post kelkaj fojoj da akupunkturado li resaniĝis. Kun ĝojo li diris al ĉiuj siaj konatoj: “La ĉina akupunkturo estas mirinda!” Tiel en mallonga tempo la famo de “mirinda pinglo” disvastiĝis inter la ŝtaticistoj kaj popoloj de Malio. Eĉ la suvereno petis kuracadon de ĉinaj kuracistoj. Por pli multe servi al la malianoj, la taĉmentoj okazigis trejnajn kursojn, por ke la lokaj kuracistoj ellernu akupunkturon.

### PLI INTIMAJ OL FAMILIANOJ

La ĉinaj kuracaj taĉmentoj alternis en ĉiu dua jaro. Por la ĉinaj kuracistoj la servo-tempo plenas de streĉeco, okupiteco kaj malfacileco. Kaj neforgesebla estas la intimo inter la ĉinaj kuracistoj kaj la lokanoj.


En Ugando, antaŭ la foriro de ĉinaj kuracistoj, sennombraj popoloj venis por adiaŭi ilin. Multaj homoj plore petis gineko-

loginon Zhang Qianyu (Ĝang Ĉjanju) resti tie. Iu gravedulino iam estis maljuste traktata pro sterileco. D-ino Zhang ne nur kuracis ŝian malsanon, sed ankaŭ zorgis pri ŝi kiel fratino. Kiel ŝi volis, ke d-ino Zhang atendu ŝian akuŝon kaj vidu ŝian bebon! Iu knabineto en la sino de sia patrino vokis: “Jaja (avino), jaja!” Fakte, du jarojn antaŭe, d-ino Zhang akuŝigis la virinon kaj savis la vivon de la patrino kaj la filino. Tial la patrino nomis ŝian filinon Zhang Namu Cicy (signi-


fanta: infano akuŝigita de Zhang post tertremo).

En Albanio ĉina kuracisto Guo Yude estis trafita de trafika akcidento kaj portita en hospitalon. Informiginte, ke d-ro Guo bezonas sangan, volontuloj staris en longa vico por donaci sian sangan. Inter ili estis maljunuloj pli-ol-70-jaraj kaj ankaŭ infanoj malpli-ol-8-jaraj. La hospitalo ŝanĝis la sangan en la tuta korpo de Guo kontraŭ la donacita. Menciante tion, d-ro Guo ne povis deteni sin de larmoj. ■

### Maŭritaniaj analizistinoj laboras, helpate de ĉinaj kolegoj.



### Ĉina kuracisto ekzamenanta akuŝintinon de Gambio





# Ĉinio en la okuloj de eksterlandanoj

Oktobre de 1996 okazis en Pekino la 4-a Internacia Foto-ekspozicio "Ĉinio en la Okuloj de Eksterlandanoj". Ĝi altiris multajn vizitantojn. La eksponataj 300 fotoj estis elektitaj el mil fotoj faritaj de 400 aŭtoroj de pli ol 50 landoj. La aŭtoroj estis alilandaj ŝtatoĉicistoj, profesoroj, studentoj, reporteroj kaj turistoj en Ĉinio. Per sia fotilo ili kaptis diversajn aferojn en la ekonomia konstruado kaj socia evoluo de Ĉinio. Iliaj fotoj montras la buntan kulturen vivon de la ĉina popolo, ĝiajn morojn kaj kutimojn kaj la vidindaĵojn kaj historiajn restaĵojn de Ĉinio kaj spegulas la amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.




**Tibetanino kun sia infano**  
Foto de Desimone Graciela (Argentino)



**Patro kaj filo en boato** Foto de Yamakawa (Japanio)



Por bone plenumi  
hejmtaskon  
Foto de Ogawa  
(Japanio)



Hartondado  
Foto de Kim Dae  
Huan (Koreio)



Biciklo-riparisto de  
Ĉinio  
Foto de Anĉiferov  
(Rusio)





Korpo-ekzercado ĉe loĝdomoj

YI ZHOU:

## Kie oni faras sportojn?

**H**EJMEN revenante post lecionaj horoj, mezlernejano Wang Qi (Ŭang Ĉji) kaj liaj kamaradoj ofte vidis arojn da knaboj ludantaj futbalon sur aŭtovojo. Je tio, li diris, ke kompare kun tiuj knaboj ili estas feliĉaj, ĉar ili posedas sian propran “futbalejon” — herbejo ĉe aŭtovoja trefkruciĝo. Tamen, iun tagon kiam ili estis energie ludantaj, kontrolistoj de la urba aspekto konfiskis ilian pilkon kun la motivo protekti herbejon kaj ilian sekurecon. Pro tio Wang Qi skribis al la urbestro, ke li konstruigu pli da futbalejoj por kontentigi la bezonon de la knaboj.

La problemo, kiun havas la knaboj, embarasas ankaŭ maljunajn pekinanojn. Pro manko de tereno trupoj de *jangge*-danco, organizitaj de ili mem, devigite aktivadas tutjare ĉe stratoj. Malgraŭ ĉio ĉi, la maljunuloj ja kontentiĝis per la dancado, ĉar, sin amuzante, ili faras fizikan ekzercadon. Tamen la tondra tamburado kaj gongado malplezurigis najbarajn loĝantojn, kiuj protestis kontraŭ tio. Iu *jangge*-dancanto sin senkulpigis: “Ankaŭ ni ne volas ĝeni la

loĝantojn, sed kiu povas liveri al ni terenon?”

Kun la efektivigo de la “Plano por sano de la civitanoj” en Ĉinio, pli kaj pli da ĉinoj aktive kaj memvole faras sportojn. Pro senĉesa altiĝo de la vivnivelo, oni elspezas por sia sano kaj ankaŭ bezonas sportejon. Kompreneble oni povas elekti sportajn programojn, kiuj ne postulas sportejon, aŭ aĉeti hejmajn sportilojn, sed tio ne helpas solvi la aktualajn problemojn de ĉiuj popolanoj, ekz., tiujn de la knaboj kaj maljunuloj. Do, ĉu estas en Ĉinio sportejo por loĝantoj fari fizikan ekzercadon?

Oni devas konfesi, ke en Ĉinio troviĝas sportejoj por sportaj amatoroj, kvankam iliaj kvanto kaj kvalito estas ne ĝojigaj. En Pekino kaj aliaj urboj oni jam malfermis al la socio iujn sporthalojn, kiuj, kun kompletaj ekipaĵoj, antaŭe estis destinitaj por trejnadokaj konkurso de oficialaj sportteamoj. Tio unue kontentigis la bezonon de tiuj, kiuj pli serioze postulas sportejon. Ili plejparte estas junuloj.

Samtempe kun la malfermiĝo de diverslokaj sportejoj al la socio, oni multe investis por ties



instalaĵoj. Ni prenas Pekinon kiel ekzemplon. En 1996, oni malfermis al la socio 206 stadionojn kaj 106 sporthalojn, kiujn vizitis 530 000 sportaj amato-roj. La Pekina Sporta Servocentro por Oficistoj kaj Laboristoj posedas la Pekinan Laboristan Stadionon, la plej grandan en Ĉinio, kaj la Pekinan Laboristan Sporthalon, en kiu estas ludejoj de volano, tabloteniso, futbalo, korbopilko, flugpilko, teniso k.a. Sole en la tablotenisejo servas 20 tabloj. Kvankam oni devas pagi por la ludejoj, tamen ili estas ĉiam oku-pataj, oni devas mendi la ludejojn por semajnfino antaŭ unu semajno.

Ankaŭ la Ĉefurba Sporthalo, kie ofte okazis internaciaj sportkonkursoj, nun malfermiĝis al la socio. Mi renkontis tie 3-membran familion ludantan volanon. La edzo estas ŝtato-ficisto, la edzino laboras kiel instruistino kaj la filino lernas en mezlernejo. La familio havas mezgradan vivnivelon de Pekino. La edzino diris al mi: "Ordinare ni ĉiuj nin okupas pri niaj propraj aferoj kaj ne havas tempon por kunes-ti. Do, ni profitas de se-majnfino por kune ludi volanon. Farante fizikan ekzercadon, ni malstreĉis nin kaj ĝuis la familian teneron. Ni ekzercas nin ĉi tie 2 fojojn ĉiumonate kaj ĉiufoje 2-3 horojn. Ĉiufoje ni pagas dekojn da juanoj. Tio ne estas malfacila por ni."

Pro tio, ke la sporthaloj servas al la publiko, la kosto por enira bileto estas relative malmulta, tio estas aprobita de la konsumantoj, sed portis al la administrantoj malfacilojn, ĉar la enspezo de plejparto da sporthaloj sufiĉas nur por la elektra pago por ilia prilumado.

Malgraŭ tio, la administrantoj ankoraŭ cerbumas por akcepti pli da amato-roj, ekz., laŭeble utiligi la sportejojn; lernantoj, instruistoj, maljunuloj kaj kripluloj ĝuas rabaton; varbi membrojn; liveri al la publiko monatbileton, doni trejnajn gvidadojn kaj konsilojn kaj aliajn servojn. Krome, la Nacia Fizik-kultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio aktive sin preparas por fondi specialan korposanigan fonduson por la Ĉina Tutlanda Sporta Fonduso kun la celo kolekti monon de la socio kaj starigi publikajn sportajn instalaĵojn.

La sportejoj de elementaj, mezgradaj kaj superaj lernejoj senpage servas al la najbaraj loĝantoj, kiuj kun granda plezuro sin ekzercas per gimnastiko kaj kurado en la sportejoj, kvankam multe pli simplaj ol la sporthaloj. Aliflanke, la naĝbaseno, sketejo kaj diverspilkaĵoj de iuj lernejoj iagrade kontentigas la bezonon de parto da sportemuloj.




En gimnastejo de lernejo

La Pekina Yuzhong-Mezlernejo situas en loĝkvartalo. Post kiam ĝi malfermis sian sportejon al la socio en septembro 1995, tie 40 000 loĝantoj faris fizikan ekzercadon. En mateno, post lecionaj horoj kaj dum festaj tagoj, la najbaraj loĝantoj senpage sin ekzercas tie per gimnastiko, kurado, ludo de korbopilko, teniso, volano kaj flugpilko. Precipe maljunuloj povas ĝoje kaj laŭplaĉe danci *jangge*-dancon ĉi tie, sen timi ĝeni la ĉirkaŭajn loĝantojn.

Xiangshan(Ŝjangŝan)-parko malproksime de la urbocentro je 20 km. situas en la nordokcidenta parto de Pekino. Matene, humida aero regas en kvieta monta arbaro. Kompare kun movoplena

urbo tie estas alia mondo. Xianglu(Ŝjanglu)-montpinton kun alteco de 557 m super la marnivelo vizitas ĉiutage multnombraj montgrimpantoj, inter kiuj estas 66-jara maljunulo. Li loĝas en la urba kvartalo. Dum 6 jaroj, ĉiutage li venas tien per la frumatena aŭtobuso por grimpi la monton, malgraŭ vento kaj pluvo. Antaŭe li estis malsana, sed nun tre bone fartas. Laŭdire en Pekino estas multaj montogrimpantoj kiel li. Ili plejparte estas emeritaj laboristoj kaj profesoroj, kaj ankaŭ multaj gejunuloj. La lastaj plejparte biciklas el la urbaj kvartaloj kaj post duonhora montogrimpado ili biciklas al la laboro. Montogrimpantoj informis, ke en la semajnfino videblas tie pli multe da montogrimpantoj kaj multaj grimpas la monton kune kun siaj familianoj. ■





Poŝtmarko kun bildo de Jiangsu-a loĝdomo

WEN YU:

## Ĝojo en filatelo

**J**AM en la infaneco mi ekŝatis belajn poŝtmarkojn. Per miaj mallertaj manoj mi malgluis la poŝtmarkojn kaj algluis ilin al kunduritaj blankaj paperoj. Poste mi denove malgluis ilin kaj algluis ilin al bela kajero... Mi fieris pri mia laboro. Sed nun mi multe bedaŭris, ke ili ĉiuj difektigis.

Poŝtmarkoj alportis al mi grandan ĝojon ne pro ilia kuriozeco nek pro altiĝo de ilia valoro, sed pro tio, ke ili ĝuigis min per sia beleco kaj riĉigis miajn sciojn per siaj bildoj.

En 1986-1991 Ĉinio emisiis serion da poŝtmarkoj pri ĉinaj loĝdomoj. La serio konsistas el 21 poŝtmarkoj. Tio multe larĝigis mian vidkampon, ĉar mi, kiu longe vivis en kvadrata korto de Pekino, neniam vidis tiel belajn domojn. La jurtoj de Interna Mongolio, kaverndomoj sur la Leŭsa Altebenaĵo kaj bambuaj domoj en la tajaj vilaĝoj en sudokcidenta Ĉinio altiris min kiel magneto. Mi do komencis kolekti poŝtmarkojn ĉiamaniere. Tio ne estis facila, ĉar en la malproksimaj lokoj mi ne havis parencon nek amikon kaj plie oni malofte uzis la poŝtmarkojn en valoro de unu kaj 1.5 fenoj (100 fenoj egalas al unu ĉina juano) kaj kun la bildoj pri mongolaj jurtoj kaj tibetaj domoj respektive. Tamen dank' al mia senlaca penado mi finfine havigis al mi ilin ĉiujn. En la kolektado mi konatiĝis kun pluraj novaj amikoj. Miaj sukcesoj ege ĝojigis min en pluraj tagoj.

“Loĝdomo de Suzhou” estas bone konata de mi. La poŝtmarkoj facile rememorigas al mi la urbon. La Suzhou-anoj plejparte loĝas en la domoj kun la dorso al rivero. En la urbo ĉie videblas mallarĝaj stratoj, riveretoj lirlantaj apud loĝdomoj, malrapide remantaj boatoj, ŝtonaj arkpontoj... Matene virinoj senbrue malfermas la malantaŭan pordon de sia domo kaj lavas rizon kaj legomojn ĉe la rivero. Ĉiutage ili komencas sian vivon ĉe riverbordo.

Kolekti materialojn kaj fari ĉelokan esploron estas granda ĝojo por filatelitoj. Antaŭ kelkaj jaroj, ĝuste kiam mi energie kolektis poŝtmarkojn kun la bildo de Anhui-a loĝdomo, mi havis ŝancon oficvojaĝi al tiu provinco. Mi kun ĝojo vojaĝis al Anhui kaj vizitis la vilaĝon Xidi (Ŝjidi). En la vilaĝo ĉiuj domoj estas antikvecaj, plejparte 300-400-jaraj. Tie mi vidis bone aranĝitajn domojn tegmentitajn per grizaj tegoloj kun blankaj muroj altaj kaj malaltaj, brikajn turojn elegante reliefigitajn kaj lignajn pordojn kun belaj ĉizajoj, kio faris sur mi belan impreson pri la Anhui-aj loĝdomoj sur la poŝtmarkoj. Tie mi informiĝis ankaŭ, ke la lukseco de la tieaj loĝdomoj strikte rilatas al la ekonomia stato de la dommastroj. En la ĉina historio multaj famaj komercistoj de Anhui-provinco devenis de Xidi-vilaĝo. Estas interese, ke tie la domoj plejparte altas kaj stratoj mallarĝas. La profundaj, zigzagaj kaj interkruĉigantaj stratoj impresas kiel labirinto por mi. Oni diris al mi, ke antaŭe tie la viroj plejparte faris komercadon aliloke, kaj en la hejmo restis nur maljunuloj, virinoj kaj infanoj. Por gardi sin kontraŭ rabistoj kaj ŝtelistoj oni konstruis la domojn tiamaniere.

Komence mi ne ŝatis la poŝtmarkojn kun la bildo de “Fujian-a loĝdomo”. Mi demandis mian amikon en Fujian-provinco: “Ĉu vi loĝas en la kuvforma domo?” Li sendis al mi poŝtkarton kun bildo de Fujian-a loĝdomo, dirante, ke la kuvformaj domoj estas apartaj loĝejoj de la tieaj enmigrintoj el aliaj provincoj. Fujian najbaras al maro. Por gardi sin kontraŭ piratoj kaj aliaj rabistoj oni loĝas koncentrite. El tero, sablo, rokoj kaj latoj oni konstruis apartajn domojn kaj poste interligis ilin, tiel ke ili formis kuvformajn domojn. Tie oni povas mangi, nokti, bredi, teni objektojn, sunumi k.a. La eksteraj muroj estas altaj kaj bone gardataj. Ili montras saĝecon de la loĝantoj kaj ilian asiron al la paca vivo. Iu japana profesoro, vizitinte tiujn domojn bone konservitajn en longaj jaroj, diris: “Ili estas misteraj kaj malfacile imageblaj. Ili similas al grandaj fungoj elkreskintaj el la tero kaj ankaŭ al UFO falintaj de la ĉielo.”

Nun la Fujian-a domo bildigita sur la poŝtmarkoj estas multe aspirata de mi. Mi deziras vojaĝi al la loko por ilin pririgardi. Tamen mi, kiu kolektis energie la poŝtmarkojn dum duonjarcento, jam fariĝis sesdek-jara maljunulino. Mi dubas, ĉu mia revo realiĝos. ■

# La azeno de Afanti

*En Ĉinio multaj konas la nomon de Afanti, sed ne scias, kiu estas lia patrolando. Precipe la rakontoj pri liaj kvazaŭ stulta saĝo kaj humuro kaj pledo por justeco kaj moko al maljustaĵoj gajnis por li senliman respekton. Afanti estas heroo folkloro. Lia nomo preskaŭ fariĝis sinonimo de saĝo kaj bonkoreco.*

*En la imago de la popolo, Afanti ĉiam portas turbanon surkape, striitan robon surkorpe kaj rajdas sur aminda azeneto. Estas vere, ke inter Afanti kaj lia azeneto estas eksterordinara amikeco. La aminda bruto ĉiam akompanas sian mastron kaj ofte ludas nemalhaveblan rolon en brilaj humuraĵoj. Ĉi-sube ni prezentas al vi tri humurajn versaĵojn rilate al la azeneto.*

## Kompano de la azeno

Afanti rajdis strate sur azeno, renkontis elefanton en promeno kun la rajdanta mastro. Ĝuste tiam l' azeno haltis kaj iais en fortpleno. La elefanta mastro ofendigis, riproĉis li Afanti-n pro la azen-ĝeno.



“Afanti!” kriis li kolermiene.  
“Kial blekegas ĝi al mi malbene?”  
Afanti lin salutis ĝentileme:  
“Ĉu tiom vi ne scias jam divene?  
Nur kiam la azeno vidas similulon  
ekfaras tian blek-turbulon!”

## Lernu la ekzemplon de azeno

En la ĉefurb' Afanti ĉie diris:

“L' azena saĝ' pli ol la ĉefministra fortas.”  
Tiu asert' en ties orelojn penetriris.  
Afanti'n oni tuj en la palacon portas.

La ĉefministro lin akuzis al la reĝo:  
“Afanti min insultis, ege krimis!...”  
Je l' plend' la reĝ' eksaltis de la seĝo,  
l' okuloj rondigitaj brile glimis.  
“Afanti, vi asertas ke l' azena saĝo  
superas tiun ĉefministran — babilaĉo!  
Se veran pruvon vi ne jam prezentos,  
la kapo via dehakitos, alte pendos.”

“Ĉu mi kuraĝus je mensogo-faro?!”  
Respektas mi ja ĉiam al realo.  
Mi foje rajdis tra iu ponteto,  
l' azeno stumblis, eĉ unu piedo  
kaptiĝis. Sed el tiu malfeliĉo  
fariĝis bono — baldaŭ ripetigo  
de la traĭro ree tra l' tereno.  
L' azeno paŝis jam kun atentemo  
kaj ĉirkaŭire l' truon sen deteno.  
Sed kiel faras ĉefministro via?  
Li ŝtelas el la ŝtata kaso nia  
pli kaj pli multe, malgraŭ denuncado  
de la popolo, kiel lup' rabia,  
Via Majesto diru post komparo,  
ĉu mia dir' komformas al realo!”

La reĝ' rigardas la Sinjoron morde:  
“Afanti pravas. Aŭskultindas liaj vortoj.  
Do Via Moŝto lernu kun zorgemo  
estonte la ekzemplon de l' azeno!”

## Lamento pro l' azeno

Subite mortis la azeno.  
Afanti ploris ĝis ŝveligo de l' palpebroj.  
Najbaro lin konsolis en ĉagreno:  
“Ne tro malĝoju, aŭ vi malsaniĝus pro l' funebro!”  
Kaplevo. Afanti kun trista mieno:  
“Mi scias: Ja ne reviviĝos la azeno.  
Sed ĝi postlasis ne farita jen aferon —  
mi ja ne devas piediri en l' Inferon!”

Esperantigis Laŭlum





Purigado de strato post pluvo

## ORDINARAJ ĈINOJ

# Urbaj beligistoj

Fotoj de Zhao Xi

En Ĉinio la stratpurigistoj estas nomataj urbaj beligistoj. Malgraŭ vintra frostoj kaj somera varmego, ili per balailoj purigas sian urbon ĉiutage, kontribuante al beligo de la urba medio.

Ĉiutage, kiam oni ankoraŭ dormas, la stratpurigistoj jam aperas sur longaj stratoj, banate de la stela lumo. Akompanate de strataj lampoj, ili lasas longan ombron post si. Ili foriras lacaj kaj ŝvitantaj, kiam sur stratoj ekiras multaj homoj al laborlokoj kaj lernejoj.

Kvankam en la ĉinaj urboj estas multaj stratpurigistoj, inter kiuj 22 000 troviĝas en Pekino, tamen tio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de rapida disvolviĝo de la urba konstruado. Ĉiu stratpurigisto devas zorgi pri pureco de

10 000 kvadrataj metroj kaj ĉiutage balai kvar fojojn sur tiu areo.

Stratpurigado estas ŝvitiga. En somero ofte pluvas kaj iam pluvo estas tre abunda kaj sur stratoj amasiĝas pluvakvo, tiam la stratpurigistoj ekstaras en vico kaj per balailoj puŝas la akvon por defluigi ĝin. Oni jam ne povas distingi inter pluvo kaj ŝvito sur ilia vizaĝo. En neĝa tago oni ne maltrankviliĝas pri malfacilo de veturo, ĉar la stratpurigistoj jam forigas la neĝon per ŝoveliloj.

Kun uzado de maŝinoj, multe mildiĝas la laborintenso de la urbaj stratpurigistoj, tamen en la lokoj, kie ne taŭgas maŝinoj, ili devas pene labori.




**Trikado antaŭ laboro**



**Stratpurigistino**

**Al laboro**



**En laborpaŭzo**





# ANEKDOTOJ PRI BOVO

de YANG ZHEN

**L**AŬ la ĉina luna kalendaro, la jaro 1997 estas Jaro de Bovo. Tial, kiam venas la Printempa Festo (la 7-a de februaro), novjaro de ĉinoj, la temo pri bovo fariĝas pli ofta.

## VIPI TERAN BOVON: PREĜO POR RIĈA RIKOLTO

Fakte, jam antaŭ la Printempa Festo komenciĝas la temo kaj aktivado pri bovo. Ĉiujare en la Printempokomenca Tago (la 4-a de februaro), oni okazigas ceremonion nomatan "Tera bovo bonvenigas printempon", kiu originis en Han-dinastio 2 000 jarojn antaŭe. Tiam frumatene de tiu tago statoficistoj de la ĉefurbo surmetis nigrajn ĉapojn kaj vestojn, starigis nigrajn flagojn, portis terajn bovojn ekster la urbon kaj vipis ilin, kio signifas stimulon al diligenta terkultivado. Poste la popolo konkure prenis la rompitaĵojn de la teraj bovoj, ĉar ili opiniis, ke la "karno" de tera bovo povas forpeli epidemion. Tia ceremonio nomiĝas "vipi teran bovon". En Song-dinastio (960-1279) la ceremonio fariĝis pli grandioza. Kiam komenciĝis la ceremonio, oni malfermis la urbopordegojn en kvar direktoj, tamburante kaj muzikante, kaj portis ekster la urbon terajn bovojn kun diverskoloraj ornamaĵoj sur la korpo. Viro alivestita kiel dio de kreskaĵoj vipis la bovojn por anonci la komencon de laboro, inkluzive de la kamplaboro, kaj por preĝi por riĉa rikolto. En la bazaroj vendiĝis malgrandaj teraj bovoj. Tiel, bovo fariĝis ne nur ĉefrolo en la ceremonio por bonvenigi novjaron, sed ankaŭ favora aŭspicio de Printempa Festo.

## JARO DE BOVO FAVORAS TERKULTIVADON

Antikvuloj opiniis, ke en Jaro de Bovo ĝenarale estas medio favora por terkultivado. En malnova bildo de 12 aĝo-simbolaj bestoj ofte estas tiaj vortoj, kiaj "Kelkaj bovoj kultivas kampon" kaj "Kelkaj drakoj reguligas riveron". Laŭ kutima kalkulo, 1997 estas jaro, en kiu "unu drako reguligas riveron" kaj "dek bovoj kultivas kampon". Oni opiniis, ke ju pli multas tiaj drakoj, des malpli multas pluvo; male, bovo estas simbolo de diligenteo, do ju pli bovoj multas, des pli bona tio estas. Tiel la jaro 1997 estas favora por kamplaboro.

Bovo estas unu el la plej frue hejmitaj bestoj. En la provincoj Shanxi, Henan kaj Sichuan estis elterigitaj fosiliaj restaĵoj de bubaloj de antaŭ 5 000 jaroj. La pli ol 300 elterigitaj kornoj, dentoj kaj nekompletaj kruroj de bovoj en la ruino Hemudu de Yuyao, Zhejiang-provinco, atestis, ke la Hemudu-anoj jam hejmitis sovaĝajn bovojn. Laŭdire, Hai, oficisto de Huangdi, povis regi bovon; estas alia diro, ke en la tempo de Shaohao oni jam povis regi bovon. En legendo Huangdi kaj Shaohao ambaŭ estis tribestroj en antikveco. Tiam ankoraŭ ne ekzistis metalaj agrikulturiloj, tial estis ne eble plugi kampon per bovo. La t.n. "regi bovon" eble signifas ŝarĝi bovon.

Oni elterigis en Jiangxi-provinco sokon, kiu montras ke ĉinoj ekuzis bovon en terkultivado jam en Shang-dinastio antaŭ 3 000 jaroj. Inter la skribaĵoj sur la ostoj de Shang-dinastio estas la ideogramo "so<sub>ko</sub>", kies formo si-

milas al bovo tirata koltro dis-tranĉanta kampon. Evidente tiam bovo-kultivado estis ordinara kaj agrikulturo eniris en la epokon de terkultivado per bruto. Tio havis profundan signifon. Kaj nun ankoraŭ estas bovo-kultivado en nemalmultaj lokoj de Ĉinio.

## DIA BOVO KREIS LA MONDON

Bovo grave rolis en agrikulturo kaj puŝis la evoluon de la homa civilizacio. La homaro dankis tian kunulon, kiu kune kun ili kreis la civilizacion. Tiel antaŭlonge originis la adoro al bovo. Plejparto de la 56 nacioj de Ĉinio adoris bovon kaj havas sennombrajn legendojn pri dia bovo.

Inter la nacimalplimulto populariĝas legendo, ke dia bovo kreis la mondon. La tagikoj opiniis, ke la mondo estas apogata de dia bovo, kaj se iu faras malbonon, la dia bovo faros alarmon per tremigo de haroj kaj kornoj, kaj sekvos tertremo. La mondkrea legendo de hani-oj rakontas, ke je la komenco ĥaoŝis la mondo, mallumis la suno kaj luno, poste filino de la ĉiela dio mortigis la dian bovon, faris el ĝia haŭto ĉielon kaj teron, el ĝiaj okuloj sunon kaj lunon, el ĝiaj dentoj stelojn kaj el ĝiaj kruroj trajojn de la ĉielo kaj tero... tiel formiĝis la nuna mondo.

La adoro al bovo kaŭzis festojn pri bovo, ekz., Bovo-kulta Festo de tuĝa-oj, Bovo-respekta Festo de gelaŭ-oj, Bovo-lava Festo de dong-oj kaj Tago de bovo-ripozado de han-oj. Malgraŭ diferencoj de manieroj, la enhavo de tiuj festoj estas nenio alia ol regali bovojn per bongustaĵoj, ilin



ornami aŭ ripozigi. La mjaŭ-oj adoris du grupojn da dioj — unu el 19 diaj bubaloj, la alian el 15 diaj bovoj, kiuj decidas la destinton de la homoj. En mateno de la Printempa Festo ĉiujare, mjaŭ-oj verŝas vinon sur la nazon de bovo, kio signifas, ke homoj pasigas la feston kune kun la bovo.

## ALIAJ RAKONTOJ PRI BOVO

En la ĉina kulturo la influo de bovo ne limiĝis en agrikulturo. En la unua ĉapitro de la ĉina muzika historio estas paragrafo pri bovo: En antikveco tri tribanoj per bovovostoj frapis siajn piedojn kaj kantis.

Laŭzi, granda pensulo de antikva Ĉinio, postlasis la faman filozofian verkon “Dao De Jing”. Laŭdire, iuj alternejoj en la Okcidento difinis, ke tiu, kiu volas studi la ĉinan kulturon, devas legi antaŭ ĉio “Dao De Jing”. Tamen

kiu scias, ke ĝuste sur la dorso de bovo Laŭzi finis la verkon?

En 284 a.K. oni faris en batalo “formacion de fajraj bovoj”, nome surmeti sur milojn da bovoj kolorajn ŝtofojn, alligi lancojn al iliaj kornoj kaj fajron al iliaj vostoj, ke miloj da soldatoj sturmu la malamikojn kun la bovoj kiel avangardo. En la ĉina milita historio tio estas tipa ekzemplo, ke malforta venkis la fortan.

Inter sennombraj popolaj legendoj la plej populara kaj kortuŝa estas tiu pri Altairo kaj Vego. En tiu romantika rakonto bovo rolis grave. Vego estis nepino de la ĉiela dio, kaj Altairo estas bovisto akompanata sole de maljuna bovo. Laŭ propono de la bovo, Altairo ŝtelis la plumveston de Vego, dum ŝi sin lavis en rivero, forlasinte la ĉielon. Sen la plumvesto Vego ne povis reveni la ĉielon kaj edziniĝis al Altairo. La paro amis unu la alian, vivis fe-

liĉan vivon kaj naskis gefilojn. Poste la ĉiela dio intencis revenigi Vegon ĉielen. La bovo diris al Altairo, ke li faru veston el ĝia haŭto post ĝia morto, por ke li povu flugi en aero postkurante Vegon. Apenaŭ Altairo atingis Vegon, la edzino de la ĉiela dio strekis la Laktan Vojon por apartigi ilin. De tiam la geedzoj nur povis sopiri unu la alian ĉe la du bordoj de la Lakta Vojo. Kortuŝite de tio, la ĉiela dio permesis, ke en la 7-a de la 7-a monato ĉiujare laŭ la ĉina luna kalendaro, ili renkontiĝu sur ponto konsistanta el pigoj. Nun en klara nokto oni povas vidi Altairon kaj Vegon ambaŭflanke de la Lakta Vojo. Se vi kaŝos vin sub pergolo en nokto de la 7-a de la 7-a monato, vi aŭdos amparolon de Altairo kaj Vego. Samtempe kun kompato al Altairo kaj Vego, oni ankaŭ sopiras la maljunan bovon, kiu sindoneme helpis ilin. ■



## 20 sanigaj ekzercoj (I)

**L**A nomitaj ekzercoj estas kreitaj de s-ro Wang Ziping (1881-1973), fama ĉina *uŝu-isto* kaj traŭmatologo, surbaze de reordigo kaj heredo de la tradiciaj ĉinaj sanigaj ekzercoj. En kreado li kombinis fortaĵojn de *tajĝjiĉuan-o* kaj *ĉigong-o* kun siaj propraj spertoj akumulitaj en kelkdek-jara ekzercado kaj klinika praktikado.

Tio estas simplaj kaj facile lerneblaj kurac-ekzercoj. Ilin povas fari viroj kaj virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj. La praktikado estas utila al resaniĝo, prevento de malsano, fortikigo kaj vivlongigo. Ili estas efikaj precipe al la suferantoj de lumbalgio, gambalgio, malsano de nukaj vertebro, skapola periartrito, genuartrito, koronaria kormalsano, hipertensio, gastroenterito, kronika bronkito, neŭrastenio kaj aliaj kronikaj malsanoj.

Atentu la jenon, farante la ekzercojn:

1. Dum ekzercado vi nepre devas esti atentema, faru la movojn malrapide, spiru egalritme kaj strebu al kvieteco.

2. Dum ekzercado vi devas pliigi la ekzercojn iom post iom. Faru la ekzercadon matene kaj vespere ĉiutage, po 30-60 minutoj. Ripetu ĉiun movon 6-36 fojojn. La komencantoj devas fari la ekzercadon laŭ sia sanstato kaj ne tro laciĝi de tio.

3. Faru la ekzercadon en la loko, kie aero estas freŝa, sen vento, kaj estu vestita dike por ne malvarmumiĝi.

4. Faru la ekzercadon persiste.

5. Ĉiufoje post la ekzercado vi devas fari reguligadon laŭ la metodoj proponitaj en ĉi tiu numero, por ke ĉiuj viaj korpopartoj reprenu la normalan staton. Se al vi mankas tempo, vi povas anstataŭe promenadi, kaj ne sidiĝu tuj post la ekzercado.

Sube estas la unua, dua, tria ekzercoj kaj reguligado. La unua ekzerco estas utila al reguligo de la spirado, pligrandigo de la pulma kapacito, elspirado de malutila gaso kaj enspirado de la utila. La dua kaj

tria ekzercoj estas utilaj por digestado, kuraco de sveliĝo de la brusto kaj ventro kaj plifortigo de la funkcio de la stomako kaj intestoj.

### Unua ekzerco

Staru kun la du piedoj en la distanco de la ŝultroj, kun la maldekstra mano sur la dekstra kaj metu la du manojn sur la subventron kun la mankaĵoj internen (Bildo 1).

Enspiru kaj elspiru malrapide, senĝene kaj profunde. Dum enspirado via ventro senkonscie sveliĝu kaj dum elspirado ĝi senkonscie malsveliĝu. Malstreĉu vin tutkorpe kun la kapo nature levita, la okuloj fermitaj kaj la langopinto delikate tuŝanta la supran makzelon. Liberigu vin el ĉia pensado kaj atenteme faru la ekzercadon.

### Dua ekzerco

Staru kun la du piedoj en la distanco de la ŝultroj kaj la du brakoj nature pendantaj ambaŭflanke de la korpo.

Fleksu viajn du kubutojn kaj levu ilin samnivele kun la ŝultroj, kun la mankaĵoj malsupren (Bildo 2).

Forte tiru la du manplatojn malsupren ĝis preskaŭ rektiĝos la du brakoj (Bildo 3). Faru tion malrapide, spiru egalritme. Enspiru, kiam vi levas la kubutojn, kaj elspiru, kiam vi mallevas ilin. Neniel detenu vin de la spirado. Streĉu la du ŝultrojn, kiam vi levas la manplatojn. Streĉu la du manplatojn kaj laŭeble malstreĉu la ŝultrojn, kiam vi mallevas ilin. Dum ekzercado viaj atento, movoj kaj spirado devas esti harmonie kunordigitaj.

### Tria ekzerco

Staru kun la du piedoj en la distanco de la ŝultroj, kun la maldekstra mano sur la dekstra kaj la mankaĵoj internen sur la brusto.

Metu viajn du manojn unu sur la alian, per ili premu viajn bruston kaj supran ventron de maldekstre dekstren kaj, turnante la manojn, premu ilin (Bildo 4).

Faru la samon en la inversa direkto.

Faru la masaĝon sur la malsupra ventro kun la umbiliko kiel la centro. Turnu viajn du manojn ĉe ĉiu spiro. Rektigu la supran korpoparton kun kapo iom alte tenata kaj rigardu supren.



Bildo 1



Bildo 2



Bildo 3



Bildo 4



S-ro Sun Yongxin

En Qingdao ĉe la Flava Rivero funkcias korporacio de medikamentoj el ruĝaj formikoj. Multaj malsanuloj resaniĝis, preninte medikamentojn el ruĝaj formikoj de la korporacio kaj ĝi ĝuas pli kaj pli grandan reputacion.

Menciante ruĝajn formikojn, oni ne povas ne paroli pri Sun Yongxin (Sun Jongŝin), ĝenerala direktoro de la korporacio. Mi dufoje intervjuis lin. Li estas mezaĝa, nealtastatura, honesta kaj malkaŝema. Li rakontis al mi, kiel li esploris ruĝajn formikojn kaj kiel li dediĉis sin al ilia oficinala uzado.

Sun Yongxin laboris kiel estro de produkta brigado kaj gubernia agrikultura buroo kaj kiel direktoro de la korporacio de agrikultura ekspluatado. Li havis plenan memfidon pri sia kariero. Tamen, kiam

# Oficinala uzado de ruĝaj formikoj

de ZHANG QINGZHEN

li estis 37-jara, li ne povis plu labori pro kormalsano kaj artika reŭmatismo suferataj de multaj jaroj.

Foje, laŭ konsilo de sia amiko li prenis ruĝajn formikojn por kelka tempo. Neatendite, liaj malsanoj mildiĝis. Li ege miris, kiel grandan kuracefikon havas la formikoj. Poste, li konsultis librojn kaj sciigis, ke ruĝa formiko enhavas proteinion 8-oble pli multan ol tiu de sojfabo, grandan kvanton da zinko kaj iom da formaldehido. Kaj la tonika efiko estas pli bona ol sovaĝa ginsengo.

Julie de 1989 li venis al la Granda kaj Malgranda Xing'an-montaroj de nordorienta Ĉinio. Li faris tie esploron pri la naskiĝloko, specioj kaj kvanto de ruĝaj formikoj kaj kunportis 80 kg da sekaj formikoj al Qingdao. Unue li mem prenis ilin kaj poste li

## Reguligado

### (a) Koncerne la artikojn:

Delikate pugnigu viajn du manojn kaj malpugnigu ilin, malforte svingu viajn du pojn 7-8 fojojn.

Svingu viajn du brakojn antaŭen kaj malantaŭen 10 fojojn.

Promenu je dekoj da paŝoj, kiam vi faras la suprajn movojn.

### (b) Koncerne la muskolojn:

Per viaj du manplatoj frapetu la muskolojn de viaj du brakoj de supre malsupren 7-8 fojojn. Knedu ilin per viaj fingroj kaj masaĝu la brakojn per viaj manplatoj.

Frapetu viajn bruston kaj ventron per viaj du manplatoj de supre malsupren 7-8 fojojn.

Frapetu viajn gluteojn kaj gambojn per viaj du manplatoj de supre malsupren kaj de interne eksteren 7-8 fojojn respektive. Vi povas frapeti kelkdek fojojn tiun korpoparton, kiu doloras al vi.

### (c) Koncerne la kapon:

Per la montraj, mezaj, ringaj kaj malgrandaj fingroj de viaj du manoj masaĝu vian kapon de la du flankoj de la frunto al la okcipito kaj nuko 7-8 fojojn kaj faru la samon en la inversa direkto ankaŭ tiom da fojoj.

Per la montraj, mezaj kaj ringaj fingroj de viaj du manoj malforte frotu la du vangojn. Daŭrigu vian frotadon laŭ la nazo supren ĝis la du flankoj de la kolo 7-8 fojojn. Faru la samon en la inversa direkto ankaŭ tiom da fojoj. ■



konsilis al siaj parencoj provi ilin. Rezulte, multaj suferantoj de artika reŭmatismo kaj hepatito sentis sin pli bone ol antaŭe. Tio pli firmigis lian decidon ekspluati oficinalan valoron de ruĝaj formikoj. La sekvantan jaron li starigis en la esplorita loko la Ekspluatan Kompanion de Ruĝaj Formikoj por kolekti kaj aĉeti ruĝajn formikojn.

La esplorado iris tre malfacile, ĉar mankis al li



**Prilaborado de ruĝaj formikoj**

kapitalo. Por solvi la malfacilon li forvendis siajn domojn, petis helpon de siaj parencoj kaj amikoj kaj registris la Ekspluatan Kompanion de Ruĝaj Formikoj. Li eklaboris en ĝi kun siaj familianoj kaj volontuloj. Li petis instalaĵojn de grandaj hospitaloj de Qingdao. Kortuŝite de Sun Yongxin, iuj fakuloj ne nur uzis ruĝajn formikojn en klinika praktiko, sed ankaŭ senpage liveris materialojn pri la kuracefiko. La Medicina Instituto de Qingdao faris analizon pri la ingredienco, veneneco, imuneco kaj kontraŭsenileco de ruĝaj formikoj. La rezulto montris, ke ruĝa formiko enhavas 27 aminajn acidojn kaj dekkelkajn mikroelementojn, bezonatajn de la homoj, kiaj kupro, zinko kaj fero. Iuj resaniĝintoj kaj iliaj familianoj memvole servis en la kompanio por danki Sun Yongxin.

1996 estis jaro ŝlosila por Sun Yongxin. Liaj medikamentoj el ruĝaj formikoj trapasis la ekspertizon de la ŝtato kaj li ricevis ateston de produktado de medikamentoj. Sankciite de koncerna departemento de Shandong-provinco, la medikamento el ruĝaj formikoj estis enlistigita en la "Normoj de ĉinaj medikamentoj de Shandong-provinco" kaj enskribita en la libron unuafoje.

En Ĉinio estas pli ol 600 specioj de formikoj. Inter ili estas dekkelkaj specioj de ruĝaj formikoj, kiuj plejparte vivas en nordorienta kaj sudokcidenta

Ĉinio. Sole en la montaroj de nordorienta Ĉinio ĉiujare haveblas ĉ. 200 tunoj da ruĝaj formikoj. Ĝenerale formikoj tre multĝemaj povas vivi 7-13 jarojn kaj formikinoj pli ol 20 jarojn. La reĝinoj de formikoj neniam eliros el siaj formikejoj, kio garantias liveradon de formikoj.

Nun Sun Yongxin kaj lia korporacio pretas disvolvi serion da produktoj, kiaj likvaĵo kaj kosmetikaĵo el ruĝaj formikoj. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* S-ro Duan Yongxing, estro de la Muzika Lernejo Nie Er, dez. kontaktiĝi kun tutmondaj esperantistaj muzikistoj, precipe tiuj el Orienta Eŭropo. Adr.: 31, Xiba Xincun, 650031 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

\* S-ino Marilene M. Mendes, lernantino, dez. kor. kun tutmondaj esperantistoj pri diversaj temoj. Adr.: Estrada do Dende, 1.250 ap. 204, Monero - Ilha do Governador Cep. 21920-001, R.Y. Brazilo.

\* Afshin Rasoulia, 25-j. studento, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adr.: No. 14. Homayun Lane, SH. Rajayi Street, Bahar Square, IR-69156 Borujerd, Irano.


\* Babak Rasoulia, 26-j. studento, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adr.: P.O. Box 165, Borujerd, Irano.

\* Jose Roberto, 26-j., dez. kor. tm. Adr.: Av. N. S. de Copacabana 245/509, Copacabana - Rio de Janeiro - R.J., 22020-030 Brazilo.

\* Raimundo Francisco dez. kor. kun 15-60-jaraj esperantistoj pri diversaj temoj kaj interŝanĝi librojn, diskojn, pm. kaj pk. Respondos al ĉiuj. Adr.: Rua 143, Cs 65-1a Etapa-Comy. Ceara; 60.530-210-Fortaleza-Ceara, Brazilo.

**Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas sendi ties specimenon.**

# Telero kun salikokaj reliefoj



La telero estas farita el kompleta peco de diafana jado laŭ ĝiaj naturaj koloroj kaj kvalito. Artisto de la Pekina Jadaĵa Fabriko skulptis ĝin 200 tagojn. La telero kun diametro de 20 cm surhavas viglajn oranĝkolorajn salikokojn reliefigitajn. Fakuloj diris, ke ĝi estas tre kurioza jadaĵo.



**En la kamparo de Smolando, Svedio de Malte Markheden (Svedio)**



**Mueliloj de Nederlando de Enrique Kohei (Argentino)**

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第一期  
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2